# Itala Fervojisto

Il Ferroviere Italiano

**2025 / 12 (2)**





*La historia stacio de Pietrarsa kaj lokomotivturnoplato, nun en la muzeo*

**La storica stazione di Pietrarsa e la piattaforma girevole per locomotive, ora nel museo**

Informa Bulteno (por la disvastigo de Esperanto)

Bollettino di Informazione (per la diffusione della lingua internazionale Esperanto)

| Quote - Materiali | € |
|---|---|
| IFEA/IFEF (tutti) | 25,00 |
| FEI (ordinario) rivista pdf | 30,00 |
| FEI (ordinario) rivista cartacea | 35,00 |
| FEI (familiare) | 17,50 |
| FEI (giovane) rivista pdf | 15,00 |
| FEI (giovane) rivista cartacea | 17,50 |
| DLF (Effettivo, in servizio o pensione) | 12,00 |
| DLF (Aderente = familiare) | 12,00 |
| DLF (Giovane) | 6,00 |
| DLF (Frequentatore) | 20,00 |
| Circolo Culturale Gruppo E-o Bologna | 5,00 |
| *Lessico Ferroviario RailLex* | *8,00* |
| *Historio de la Fervojista E.o-Movado* | # |
| *Historio de IFEF 1909-1984* * | # |
| *Suplemento al Historio 1984-1999* * | # |
| *NomListoj el la Historia broŝuroj* * | # |
| *Suplemento al Historio 1999-2019* * | # |
| *Statuto kaj Regularo IFEF* * | # |
| * *Pubblicazioni ricevibili gratis per posta elettronica.*<br># *Pubblicate sul sito www.ifef.net* | |

Romano Bolognesi Via Misa, 4
IT-40139 Bologna BO
Vito Tornillo Via D'Acquisto, 9/5
IT 40050 Monte San Pietro BO
☎ +39 051 547 247 / +39 3383803406
<bolognesiromano@alice.it> <vitorni@virgilio.it>

La Redakcio de "ITALA FERVOJISTO" varme dankas la multajn, kiuj legis kaj esprimis aprecon pri nia Bulteno. Tiuj vortoj estas kuraĝigaj kaj subtenigaj. Sugestoj kaj kontribuoj al artikoloj kaj rimedoj estos kore bonvenaj.
Koran dankon al la Lingva kontrolantoj:
**Alla Kudryashova - Luiza Oberrauch - Gianfranco Tomba**.

La fontoj de la artikoloj aperas je la fino, fotoj estas faritaj de la redaktantoj mem, el la fonta artikolo, elĉerpitaj el la reto.
La Redakcio
La fonte degli articoli è menzionata alla fine degli stessi; le foto sono dei redattori, parte dell'articolo originale, dalla rete.
*La Redazione*

**Attenzione**: la quota 2026 è rimasta **25,00** €. I ritardatari 2025 versino per i 2 anni 50,00 €. Vedere a lato le possibilità di adesioni, le offerte di pubblicazioni o vari altri casi.
**Attenzione**: il numero del Conto Corrente Bancario del Segretario IFEA è il seguente: Vito Tornillo c/o Banca INTESA Zola Predosa (BO)
**IBAN IT 31 U 03069 37133 100000001497**

***Rinnovate subito la quota:***
l'IFEA potrà così meglio programmare e operare.
Segnalate sempre:
**causale, cambio di dati e di indirizzo!**
*Fate iscrivere un collega, un familiare, un amico, un samideano: dobbiamo crescere in qualità, ma anche in quantità.* *La Kasisto*

## *Enhavo*



| *Temoj* | *Paĝo* |
|---|---|
| Quote - Materiali / *Enhavo* | 2 |
| Note di redazione ... | 3 |
| Sicurezza sui treni, controllore con la Bodycam<br>Trajna Sekureco, personaro kun Korpokamerao | 4 - 5 |
| Arenaways terza alternativa nelle ferrovie italiane<br>Arenaways tria alternativo en la italaj fervojoj | 6 - 7 |
| Evoluzione della stazione AV Mediopadana<br>Evoluo de la AV-stacio Mediopadana | 8 - 9 |
| 1925 nasce il Dopolavoro Ferroviario<br>En 1925 naskiĝis la Dopolavoro Ferroviario | 10 - 13 |
| Trieste-Belgrado in treno<br>Triesto-Beogrado per trajno | 14 |
| Il futuro del trasporto merci ferroviario in Serbia<br>La estonteco de fervoja vartransporto en Serbio | 15 - 16 |
| Il museo di Trieste Campo Marzio<br>Muzeo Triesto Campo Marzio | 16 - 17 |
| Museo di Pietrarsa / Pietrarsa fervojmuzeo | 18 - 19 |
| Che cos'è una funicolare? /<br>Kio estas funikularo? | 20 - 23 |
| Lo sapevi? / Cu vi sciis? | 24 - 25 |
| Il Culto dell'Autobus / La Kulto pri la aŭtobuso | 26 - 27 |
| Il treno su gomma micheline<br>La pneŭmatika trajno "micheline" | 28 |
| Vita dell'IFEA | 29 |
| IFK 2026 in Serbia | 29 |
| Assemblea FISAIC Asembleo | 30 - 31 |
| Il viaggio nella volontà<br>Vojaĝo en la volo | 32 - 39 |
| Rime / Rimaĵoj | 38 |
| Aneddoti / Anekdotoj | 42 |
| Facezie / Humuraĵoj | 45 |
| Proverbi / Proverboj | 46 |
| Esperanto per immagini /<br>Esperanto per bildoj | 47 |
| *Kolofono* // Leggere l'E-o | 48 |

# Note di redazione ...

Cari *samideani!*

Questo numero della nostra rivista ci invita a un viaggio attraverso le molteplici sfaccettature del mondo ferroviario contemporaneo.

La sicurezza a bordo treno e in stazione è diventata una priorità assoluta per le compagnie di trasporto, in risposta ai continui atti di violenza ai danni del personale. Per tutelare sia gli operatori che i viaggiatori, sono state adottate misure tecnologiche avanzate.

I treni di ultima generazione sono equipaggiati con telecamere installate nelle carrozze, le cui immagini vengono trasmesse in tempo reale su monitor a disposizione del personale. In aggiunta, gli addetti vengono dotati di body-cam da taschino, per poter registrare in modo diretto eventuali scene di violenza in cui sono coinvolti, fungendo da deterrente e fornendo prove concrete.

Il panorama dell'Alta Velocità italiana, il 2013 segna la fine del monopolio di Trenitalia (FS) con l'ingresso di Italo Treno, è destinato a espandersi ulteriormente. Presto si uniranno al servizio un terzo operatore, Arenaways, e a seguire un quarto (TGV), intensificando la concorrenza sulle principali linee di collegamento. Un esempio emblematico del potenziale di sviluppo è la stazione di Reggio Emilia AV Mediopadana. Nata inizialmente come semplice stazione di servizio sulla linea Milano-Bologna, è l'unica nel suo genere a trovarsi sulla linea AV. In soli dieci anni, la Mediopadana ha visto uno sviluppo eccezionale, con decine di treni che ora vi fermano, servendo un vasto bacino e registrando un incremento di viaggiatori ben superiore alle aspettative iniziali.

In ottobre 2025 si è celebrato il centenario della nascita del Dopolavoro Ferroviario Italiano (DLF). L'articolo ripercorre la sua breve ma significativa storia, evidenziando il ruolo cruciale che questa istituzione ha avuto nella vita sociale, culturale e ricreativa di tutti i ferrovieri.

Il prossimo congresso dell'IFEF a maggio in Serbia accende i riflettori sul potenziamento dei collegamenti ferroviari. Due articoli dedicati analizzano gli sforzi in corso per connettere meglio la Serbia all'Europa, in particolare attraverso la rivalutazione del trasporto merci e i collegamenti TEN (Trans-European Networks). Si sta inoltre valutando la possibilità di far rivivere una ferrovia dismessa che collegherà Trieste a Belgrado, un progetto che riporterebbe in vita un asse storico.

L'importanza dell'aggregazione e della cultura è stata ribadita in settembre a Caserta, durante l'Assemblea Generale della FISAIC. L'evento ha riunito i responsabili dei dopolavoro internazionali per un momento di scambio di esperienze e per la visita di luoghi di interesse, tra cui l'emblematico Museo Ferroviario di Pietrarsa a Napoli. Nell'articolo una breve presentazione del Museo di Pietrarsa con alcune foto, e del rinnovato Museo Ferroviario di Trieste. Quest'ultimo, meta di una visita durante il congresso IFEF del 2009 (con foto dell'epoca), sarà a breve ultimato il restaurato e riconsegnato ai visitatori, valorizzando ulteriormente il patrimonio storico ferroviario italiano. Completano la rivista alcuni approfondimenti tematici: Il culto dell'autobus Alessandro ci porta per le vie di Roma alla scoperta della linea 771; Curiosità sulle funicolari, con un focus sul loro funzionamento e sulle celebri funicolari di Napoli; Uno sguardo al passato con il singolare treno su gomma di Michelin. Infine, invitiamo a riflettere, durante una breve pausa di questa frenetica vita, su proverbi, aneddoti, poesie e curiosità più diverse. Avanti Esperanto!



Vidpunktoj - Punti di vista

# Sicurezza sui treni, controllore con la Bodycam
# Trajna Sekureco, personaro kun Korpokamerao

Nuove soluzioni tecnologiche al servizio della sicurezza sui treni. Contro le aggressioni, Trenitalia, oltre alla già diffusa videosorveglianza a bordo dei vagoni, schiera anche le bodycam indossate dal personale viaggiante.
Così, dopo la sperimentazione partita a marzo del 2024 in Emilia-Romagna, è arrivato il via libera per le altre regioni.
La videocamera appuntata al petto del capotreno verrà tenuta sempre accesa, ma non registra tutto il tempo: il personale di FS deve indossarla all'altezza del taschino della giacca, in modo tale che sia ben visibile. Le telecamere vengono accese a inizio turno, ma non riprendono nulla, e può avviare la registrazione in caso di pericolo.
Le bodycam per il personale dei treni hanno un duplice obiettivo: da una parte possono funzionare come deterrente al fine di contrastare le minacce e le aggressioni sui treni, dall'altra servono concretamente a registrare episodi di violenza in modo da avere video da mettere a disposizione della polizia nel caso di denunce. I video vengono registrati in modo criptato: gli addetti di Ferrovie dello Stato e Trenitalia non possono quindi vederli, modificarli o cancellarli. Solo le forze dell'ordine e il personale autorizzato di FS possono vedere i video registrati. Le società li consegnano in caso di denunce. Secondo un report di FS Security, nel 2024 le denunce per aggressione al personale ferroviario sono state 381, in calo rispetto al 2023 quando erano state 427. A gennaio del 2025 sono diminuite ulteriormente del 47 per cento rispetto a gennaio del 2024.



Novaj teknologioj proponas solvon por trajna sekureco. Por kontraŭbatali agresojn, *Trenitalia*, krom la jam disvastigita videogvatado sur vagonoj, adoptas ankaŭ korpokameraojn portatajn de trajna personaro en kritikaj situacioj. Post eksperimentado ekde marto 2024 en Emilio-Romanjo, oni interkonsentis por uzi ĝin ankaŭ en aliaj regionoj.
La kamerao alpinglita al la brusto de la trajnestro estos ĉiam ŝaltita, sed ĝi ne filmas la tutan tempon: FS-personaro devas porti ĝin ĉe la alteco de sia jakpoŝo, por ke ĝi estu klare videbla.
La kameraoj ŝaltiĝas komence de la deĵortempo kaj povas aktiviĝi en kazo de danĝero.
Korpokameraoj por trajna personaro havas duoblan celon: unuflanke, ili povas funkcii kiel malinstigo por kontraŭstari minacojn kaj atakojn en trajnoj, kaj aliflanke, ili efike filmas eventualan perforton kaj la filmetoj estu disponeblaj al la polico en kazo de denunco. La filmetoj estas registrataj nedeĉifrebla: dejorantoj de *Ferrovie dello Stato* kaj *Trenitalia* ne povas ilin spekti, ŝanĝi aŭ forigi. Nur policanoj kaj rajtigitaj dungitoj de FS rajtas spekti la registritajn filmetojn. La kompanioj transdonos ilin en kazo de denunco.
Laŭ raporto de *FS Security*, en 2024 estis 381 denuncoj pri agresoj kontraŭ fervoja personaro, 427 malpli kompare kun 2023. En januaro 2025, tiuj malpliiĝis je 47 procento kompare kun januaro 2024.
*FS Security* atribuas ĉi tiun rezulton al pluraj adoptitaj sekurecaj normoj, inklu-

FS Security attribuisce questo risultato a diverse misure di sicurezza adottate, tra cui l'introduzione delle bodycam e l'implementazione di nuove tecnologie di videosorveglianza avanzate, che sfruttano l'intelligenza artificiale per rilevare situazioni critiche e attivare tempestivamente gli allarmi.

L'integrazione tra tecnologie di prevenzione e intervento dimostra come l'uso di strumenti innovativi possa migliorare la sicurezza del personale ferroviario, contribuendo a ridurre le aggressioni e a garantire un ambiente di lavoro più sicuro.

Tutti i treni nuovi hanno delle telecamere che mandano sugli schermi le immagini di tutto il treno e degli altri passeggeri negli altri vagoni.□

*(FS Informa)*



zive de la enkonduko de korpkameraoj kaj lanĉo de novaj progresintaj teknologioj pri videogvatado, kiuj utiligas artefaritan inteligentecon por detekti kritikajn situaciojn kaj rapide aktivigi alarmojn.

La integriĝo de preventaj kaj intervenaj teknologioj montras kiel la uzo de novigaj iloj povas plibonigi la sekurecon de fervoja personaro, helpante malaperigi agresojn kaj garantii pli sekuran labormedion.

Ĉiuj novaj trajnoj havas kameraojn, kiuj montras sur ekranoj bildojn de la tuta trajno kaj de aliaj pasaĝeroj en la aliaj vagonoj.□

*(Trad: ViTo)*




## La sala d'aspetto

**< Gianni Rodari >**

Chi non ha casa e non ha letto
si rifugia in sala d'aspetto.
Di una panca si contenta,
tra due fagotti s'addormenta.
Il controllore pensa: "Chissà
quel viaggiatore dove anderà?"
Ma lui viaggia solo di giorno,
sempre a piedi se ne va attorno:
cammina, cammina, eh, sono guai,
la sua stazione non la trova mai!
Non trova lavoro, non ha tetto,
di sera torna in sala d'aspetto:
e aspetta, aspetta, ma sono guai,
il suo treno non parte mai.
Se un fischio echeggia di prima mattina,
lui sogna d'essere all'officina.
Controllore non lo svegliare:
un poco ancora lascialo sognare.□

## La atendejo

Tiu, kiu nek hejmon nek liton havas,
en la atendejo rifuĝas.
Li je benko kontentiĝas,
kaj inter du pakaĵoj endormiĝas.
La kontrolisto pensas: "Kiu scias,
Kien tiu vojaĝanto iras?"
Sed li veturas nur dumtage,
piede ĉiam vagadas ĉirkaŭe:
marŝas, marŝas, ho, estas damaĝoj,
neniam trovas li sian stacion!
Li ne trovas laboron, ne havas ŝirmejon,
vespere li revenas atendejon:
kaj atendas, atendas, sed damaĝoj estas,
lia trajno neniam startas.
Se fajfo eĥiĝas frumatene,
li sonĝas esti ĉe la laborejo.
Kontrolisto, ne veku lin:
iom pli longe lasu sonĝi lin.□

# Arenaways la terza alternativa nelle ferrovie italiane
# Arenaways la tria alternativo en la italaj fervojoj

Dopo anni di attesa, il marchio Arenaways torna sui binari con l'obiettivo di diventare il terzo grande operatore ferroviario in Italia, accanto a Trenitalia e Italo.

La storia di Arenaways inizia negli anni 2010, quando l'ex capostazione Giuseppe Arena provò a introdurre concorrenza nei treni regionali. Allora il progetto crollò per ostacoli burocratici e limiti di accesso alle stazioni intermedie.



Motorunuo - Arenaways - treno

Oggi, sotto la guida di Longitude Holding e con il forte sostegno della compagnia spagnola Renfe e del fondo Serena Industrial Partners, l'azienda ci riprova con basi più solide.

Dal 27 gennaio 2025 i primi treni Arenaways in Piemonte. La compagnia gestisce la linea regionale Cuneo–Saluzzo–Savigliano, con un contratto decennale. Per il 2026 è previsto il rilancio della linea Ceva–Ormea.

La compagnia utilizza moderni convogli diesel Pesa ATR 220 con WiFi, spazi per bici e carrozzine e piena accessibilità.

Il vero obiettivo è andare oltre i servizi regionali ed entrare nel mercato delle lunghe percorrenze e delle tratte internazionali:
Torino–Milano,
Torino–Lecce, Torino–Venezia,
Roma–Reggio Calabria e persino
Milano–Monaco.




Mapo de la linioj - mappa delle linee

Post jaroj da atendo, la marko *Arenaways* revenas sur la relojn kun la celo iĝi la tria granda fervoja firmao en Italio, krom *Trenitalia* kaj *Italo.*

La historio de *Arenaways* komenciĝis en la 2010-aj jaroj, kiam la eksa staciestro *Giuseppe Arena* provis enkonduki konkurencon en regionaj trajnoj. La projekto tiam kolapsis pro burokrataj baroj kaj manko de aliro al mezaj stacioj.

Nun, sub la ombrelo de kompanio *Longitude Holding* kaj kun forta subteno de la hispana *Renfe* kaj la invest-fonduso *Serena Industrial Partners*, la firmao denove provas sian ŝancon sur pli forta fundamento.

La unuaj *Arenaways*-trajnoj en Piemonto ekveturis la 27-an de januaro 2025. La kompanio funkciigas la regionan linion *Cuneo–Saluzzo–Savigliano*, laŭ dekjara kontrakto. Por la jaro 2026 estas planata plia relanĉo de la linio *Ceva–Ormea.*

La kompanio uzas modernajn "Pesa" ATR 220-dizelajn motorunuojn kun vifio, spaco por bicikloj kaj plena alireblo. La vera celo ne estas oferti nur regionajn servojn, sed eniri la merkaton de longdistancaj kaj internaciaj itineroj:
Torino–Milano,
Torino–*Lecce*, Torino–Venecio,
Romo– *Reggio Calabria*, eĉ
Milano–Munkeno.

Il modello europeo di *open access* potrebbe finalmente permettere questo salto.

Trenitalia resta il gigante del settore, Italo il re dell'alta velocità. Arenaways dovrà puntare su affidabilità, comfort e prezzi competitivi per guadagnarsi spazio. L'avvio in Piemonte ha già dato segnali positivi: puntualità vicina al 99%.

**Si prospetta una nuova era per i viaggiatori:**

Se il progetto avrà successo, Arenaways non solo porterà più scelta e tariffe potenzialmente più basse, ma potrà anche ridare vita a linee provinciali "dimenticate".




In un momento in cui l'Europa spinge verso trasporti più sostenibili, il ritorno di questo marchio potrebbe segnare l'inizio di una nuova stagione per le ferrovie italiane.□

*(Arenaways info)*

La eŭropa modelo pri *open access* povus finfine ebligi tiun kvalitsalton.

*Trenitalia* restas la giganto de la sektoro, dum *Italo* la reĝo de altrapidaj linioj. *Arenaways* ofertu fidindecon, komforton kaj allogajn prezojn por gajni sian lokon. La unua semajno en Piemonto jam montris altan positivan signalon: preskaŭ 99% da ĝusttempeco.

**Nova epoko por vojaĝantoj:**

Se la projekto de *Arenaways* sukcesos, ĝi ne nur alportos pli da eblecoj kaj eble malpli altajn tarifojn, sed ankaŭ redonos vivon al "forlasitaj" provincaj linioj.

En tempo kiam Eŭropo serĉas pli verdajn vojaĝ-alternativojn, la reveno de ĉi tiu marko povus signifi novan epokon por la italaj fervojoj.□

*(Trad: ViTo)*

## La stazione centrale di Stoccolma,

in Svezia, è riscaldata con il calore del corpo dei passeggeri.

Come? Ci sono più di 250000 persone che passano per la stazione centrale ogni giorno: il nuovo sistema di ventilazione convoglia il calore in eccesso emanato dai viaggiatori in appositi scambiatori in grado di convertirlo in acqua calda che viene poi pompata nel sistema di riscaldamento.



In base alle dichiarazioni del direttore della stazione, questo sistema oltre a essere ecologico, ha ridotto del 25% i costi di riscaldamento.□

## Stokholma Centra Stacio,

en Svedio, estas varmigita per la korpa varmeco de pasaĝeroj.

Kiel? Tra la centra stacidomo trapasas ĉiutage pli ol 250000 homoj: la nova aerumadsistemo enkanaligas la troan varmon eligitan de vojaĝantoj en specialajn varminterŝanĝilojn kapablajn konverti ĝin en varman akvon, kiu poste estas pumpita en la hejtsistemon.

Laŭ la vortoj de la direktoro de la stacidomo, ĉi tiu sistemo, krom esti ekologia, reduktis hejtadkostojn je 25%.□

# Evoluzione della stazione AV Mediopadana
# La evoluo de la stacio AV- *Mediopadana*

Quando nel giugno del 2013, fu inaugurata la stazione dell'alta velocità Mediopadana, in pochi avrebbero scommesso sul suo successo. All'epoca infatti, si contavano appena otto coppie di treni al giorno, qualche centinaio di passeggeri e un parcheggio da 400 posti. Dodici anni dopo i convogli che si fermano ogni giorno sono circa novanta, i passeggeri annui toccano quota 1,7 milioni - con un incremento costante negli ultimi anni - e i posti auto sono diventati 2400. Non solo: la Mediopadana è diventata un nodo fondamentale per l'intero bacino mediopadano, punto di connessione tra città metropolitane e area vasta.



Vido laŭ aŭtoŝoseo - Vista dall'autostrada

Progettata dall'archistar spagnola Santiago Calatrava, la stazione ad oggi è l'unica fermata intermedia della linea ad alta velocità Milano-Bologna. Sorge a circa 4 chilometri a nord dal centro di Reggio Emilia, nella frazione industriale di Mancasale, e insieme ai celebri ponti a vela sull'autostrada del Sole forma un complesso che ha radicalmente ridisegnato la zona settentrionale della città.

Ripercorrendo la storia della struttura, la Mediopadana è entrata in funzione nel 2008 come semplice posto di movimento, sotto il nome di 'Reggio Emilia AV, mentre i lavori per la costruzione della stazione vera e propria iniziarono nel 2010, con un costo complessivo di 79 milioni di euro. Le fondazioni furono poi completate nel gennaio 2012, e l'inaugurazione ufficiale si tenne l'8 giugno 2013, con la piena attivazione del servizio.

Kiam la *Mediopadana*-rapidtrajnostacio malfermiĝis en junio 2013, malmultaj kredis je ĝia sukceso. Tiutempe, estis nur ok paroj da trajnoj ĉiutage, kelkcentoj da pasaĝeroj, kaj parkejo kun 400 lokoj. Post dekdu jaroj, proksimume naŭdek trajnoj haltas ĉiutage, ĉiujare la pasaĝeroj atingas 1,7 milionojn - kun daŭra kresko en la lastaj jaroj - kaj la parklokoj iĝis ĝis 2400. Krome, la *Mediopadana*-stacio fariĝis ĉefnodo por la tuta *Mediopadana* baseno, ligpunkto inter metropolaj urboj kaj pli vasta areo.

Projektita de la hispana fama arkitekto Santiago Calatrava, la stacio estas nuntempe la sola haltejo sur la rapidtrajnolinio Milano-Bolonjo. Ĝi situas proksimume 4 kilometrojn norde de la centro de Reggio Emilia, en la industria distrikto *Mancasale*, kaj kune kun la famaj velpontoj super la Aŭtovojo de la Suno, ĝi formas komplekson, kiu draste ŝanĝis la nordan parton de la urbo.

Rilate al la historio de la strukturo, la *Mediopadana*-stacio ekfunkciis en 2008 kiel simpla transiga stacio, sub la nomo *Reggio Emilia AV*, dum la konstruado de la stacio mem komenciĝis en 2010, je totala kosto de 79 milionoj da eŭroj. La fundamentoj estis kompletigitaj en januaro 2012, kaj la oficiala inaŭguro okazis la 8-an de junio 2013, kun plena funkciaktivigo.

El arkitektura vidpunkto, la stacio reprezentas unu el la plej rekoneblaj nuntempaj ikonoj de la regiono. Ĝi estas 483 metrojn longa, averaĝe 20 metrojn

Dal punto di vista architettonico, l’opera rappresenta una delle icone contemporanee più riconoscibili della regione. È lunga 483 metri, alta in media 20, e composta dalla ripetizione di 25 moduli ondulati, ciascuno formato da tredici portali in acciaio. Il risultato è un effetto dinamico che richiama il movimento di una gigantesca onda bianca, ormai diventata celebre agli occhi degli automobilisti che la vedono ogni giorno al fianco dell’autostrada. Una sorta di colosso d’acciaio che governa l’area nord della città, in continua trasformazione.
Negli ultimi anni, Comune, Rfi, ministero dei Trasporti e privati hanno investito oltre 27 milioni di euro per migliorare infrastrutture e accessibilità. Tra gli interventi principali: l’ampliamento dei parcheggi, la realizzazione di una nuova hall d’ingresso sul lato est - con ascensori e scale mobili - e la riqualificazione di 3.700 metri quadrati nel sottoviadotto, destinati a nuovi servizi per i viaggiatori.
Restano però alcuni nodi irrisolti, in occasione dei 10 anni dall’inaugurazione. La priorità è infatti quella di migliorare i collegamenti locali: oggi raggiungere la Mediopadana dal centro città o dalla stazione storica non è sempre agevole. Manca ancora una connessione rapida e strutturata con le ferrovie storiche o un sistema simile a quello dell’Aerobus bolognese. A fare la differenza nei prossimi anni saranno soprattutto i collegamenti, per farla diventare davvero una stazione al centro della mobilità quotidiana.□ *(infofsnews)*





Enirejo de la stacidomo - Ingresso stazione

alta, kaj konsistas el 25 ripetaj ondiĝantaj eroj, ĉiu konsistanta el 25 ŝtalaj portaloj. La rezulto estas dinamika efekto rememoriga pri giganta blanka ondo, nun fama inter ŝoforoj, kiuj vidas ĝin ĉiutage apud la aŭtovojo. Temas pri ŝtala koloso, kiu dominas la konstante ŝanĝiĝantan nordan parton de la urbo.
En la lastaj jaroj, la Municipo (de *Reggio Emilia*), *RFI*, la Ministerio pri Transporto kaj privatuloj investis pli ol 27 milionojn da eŭroj por plibonigi infrastrukturon kaj alireblecon. Inter la ĉefaj projektoj: la pligrandigo de parkejoj, la konstruado de nova enirejo ĉe la orienta flanko - kun liftoj kaj rulŝtuparoj - kaj la renovigo de 3700 kvadrataj metroj sub la viadukto, celanta novajn pasaĝerajn servojn.
Tamen, kelkaj nesolvitaj problemoj restas, dum oni festas la 10-an datrevenon de ĝia inaŭguro. La prioritato estas plibonigi lokajn konektojn: nuntempe atingi la *Mediopadana*-stacion de la urbocentro aŭ de la historia stacidomo ne ĉiam facilas. Rapida kaj organizita kunligo al la historiaj fervojoj aŭ sistemo simila al *Aerobus* en Bolonjo daŭre mankas. Kio faros la diferencon en la venontaj jaroj estos la konektoj, por igi ĝin vere stacidomo en la centro de ĉiutaga movebleco.□

*(Trad: ViTo)*



# 1925 nasce il Dopolavoro Ferroviario
# En 1925 naskiĝis la *Dopolavoro Ferroviario*

Il Dopolavoro Ferroviario (DLF) celebra nel 2025 il suo centenario, un traguardo che testimonia un secolo di impegno nel promuovere cultura, sport e aggregazione sociale tra i lavoratori delle ferrovie e le loro famiglie.

La *Dopolavoro Ferroviario* (DLF) (Libertempa Organizaĵo por Fervojistoj) festas sian centjariĝon en 2025, mejloŝtono kiu atestas jarcenton da sindediĉo al la antaŭenigo de kulturo, sportoj kaj sociaj renkontiĝoj inter fervojistoj kaj iliaj familioj.




Fondato nel 1925, il DLF ha attraversato epoche di profondi cambiamenti, adattandosi alle esigenze dei ferrovieri e contribuendo alla vita sociale e culturale delle comunità locali italiane.
Scopo del DLF "promuovere il sano e proficuo impiego da parte degli agenti ferroviari delle ore libere dal servizio …" (Art. 1).
Il regio decreto legge n° 1908 del 25 ottobre 1925 sancisce la nascita del Dopolavoro Ferroviario, il primo e più importante dopolavoro per numero di aderenti e per la dimensione delle iniziative sviluppate. A fronte di un lavoro duro e logorante, i ferrovieri hanno la possibilità di ritrovarsi e di vivere, insieme alle loro famiglie, esperienze nuove ed originali fatte di incontri con persone diverse, di attività sportive e culturali e di prime forme di turismo organizzato. Al vigoroso e immediato sviluppo del DLF

Fondita en 1925, DLF travivis profundajn ŝanĝojn, adaptiĝante al la bezonoj de fervojistoj kaj kontribuante al la socia kaj kultura vivo de lokaj italaj komunumoj.
La celo de DLF estas "antaŭenigi la sanan kaj profitodonan uzon de eksterlaboraj horoj fare de fervojistoj..." (Art. 1).
Reĝa Dekreto-Leĝo N-ro 1908 de la 25-a de oktobro 1925 estigis la *Dopolavoro Ferroviario*-n, la unuan kaj plej gravan postlaboran asocion laŭ membraro kaj la amplekso de ĝiaj iniciatoj.
Malgraŭ sia malfacila kaj laciga laboro, fervojistoj havas la ŝancon renkontiĝi kaj ĝui, kune kun siaj familioj, novajn kaj originalajn spertojn per renkontoj kun diversaj homoj, sportaj kaj kulturaj agadoj, kaj fruaj formoj de organizita turismo. La viglan kaj tujan evoluiĝon

contribuiscono la capillarità della rete ferroviaria, la facilità e la rapidità di comunicazione sul territorio nazionale e, non ultimo, il grande spirito di corpo dei ferrovieri. Una storia, quindi, che affonda le sue radici nel territorio.
Nel 1935 il Dopolavoro Ferroviario conta già 273 sedi in tutta Italia e 135 mila soci che, con le loro quote, contribuiscono a sostenerne le molteplici attività.
In quegli anni l'attività si esercita soprattutto nel settore dell'assistenza sociale alle famiglie (la Befana per i figli dei dipendenti è ben nota) e nella gestione delle attività tipiche dello sport e della cultura con corsi di formazione professionali, escursioni in Italia e all'estero, biblioteche e centri "radiofonici" e "cinematografici".
Nuclei di dopolavoristi si dedicano all'allevamento di animali da cortile e alla coltivazione dei terreni adiacenti gli impianti ferroviari. Le stazioni ferroviarie sono abbellite dai soci del DLF che ne curano le aiuole e l'arredamento.
Nel difficile periodo del dopoguerra, della ricostruzione delle ferrovie e del Paese intero, la voglia di partecipazione e di novità fece fiorire attività che confermarono il Dopolavoro dei ferrovieri come la più importante organizzazione del tempo libero e ottenne, nel 1947, lo specifico riconoscimento del Ministero degli Interni riservato agli enti nazionali con finalità socio-assistenziali. Aree e fabbricati delle Ferrovie dello Stato vennero assegnati al DLF.
Dal 1970 al 1990 il Dopolavoro Ferroviario subisce grandi trasformazioni: viene concessa una più ampia autonomia alle sezioni DLF che rimarranno in vigore fino al 1995.
Sono gli anni in cui si realizza un grande potenziamento del DLF attraverso consistenti investimenti negli impianti sportivi, nelle sedi sociali, nelle strutture turistiche e ricreative.

de DLF helpis la kapilareco de la fervoja reto, la facileco kaj rapideco de komunikado tra la lando, kaj, fine sed ne laste, la granda kunlaboremo de la fervojistoj. Historio, do, profunde enradikiĝinta en la teritorio.
En la jaro1935, *Dopolavoro Ferroviario*




havis 273 lokajn sidejojn tra Italio kaj 135000 membrojn, kiuj, per siaj kotizoj, helpis subteni ĝiajn multajn agadojn.
En tiuj jaroj, ĝiaj agadoj fokusiĝis ĉefe al socia helpo por familioj (la Epifanio por la infanoj de laboristoj estis bone konata) kaj la mastrumado de tipaj sportaj kaj kulturaj agadoj, kun profesiaj trejnaj kursoj, ekskursoj en Italio kaj eksterlande, bibliotekoj, kaj radio- kaj filmcentroj. Grupoj da membroj sin dediĉis al bredado de kortaj bestoj kaj kultivado de la tero apud la fervojaj instalaĵoj. Fervojajn staciojn plibeligis DLF-membroj, kiuj zorgis pri la florbedoj kaj meblaroj. En la malfacila postmilita periodo, dum la rekonstruo de la fervojoj kaj de la tuta lando, la deziro je partopreno kaj novigado ebligis agadprosperon, kiu igis la *Dopolavoro Ferroviario*-n la plej gravan libertempan organizon. En 1947, ĝi ricevis specifan agnoskon de la Ministerio pri Internaj Aferoj, rezervitan al naciaj organizoj kun sociaj celoj. Areoj kaj konstruaĵoj, kiujn posedis la Italaj Ŝtataj Fervojoj,

Si estende quasi ovunque la gestione da parte del DLF delle mense ferroviarie, con importanti investimenti nei fabbricati mensa e nelle strutture. Il servizio è gestito dal DLF fino al 2009.
Il 10 maggio 1995 le Organizzazioni Sindacali e le FS SpA provvedono a costituire l'Associazione Nazionale DLF. Sul territorio la trasformazione del DLF in Associazione si era già realizzata con la riforma del 1972.



Nel 2000 la Società FS comunicava all'Associazione Nazionale DLF che gli immobili fino a quel momento utilizzati dal DLF (sedi sociali e spazi ricreativi, impianti sportivi e aree verdi) erano diventati oggetto di valorizzazione e non sarebbero più stati concessi al DLF a titolo gratuito, così come era stato nei precedenti 75 anni.
È stato un momento molto difficile e per qualche aspetto anche drammatico. Si è posto da subito il problema di come garantire alle Associazioni DLF territoriali la disponibilità dei beni immobili che consentisse di svolgere le loro attività. Questo infatti rappresentava il principale requisito per l'esistenza e la vita del Dopolavoro Ferroviario: senza sedi sociali e impianti sportivi il DLF avrebbe dovuto chiudere. Scongiurato il pericolo della alienazione dei beni, l'Associazione Nazionale ha preso la decisione di pagare regolari canoni locativi per gli immobili e acquistarne una parte.
Attualmente il Dopolavoro Ferroviario è costituito da un'Associazione Nazionale e 92 Associazioni territoriali. Le Associazioni territoriali sono i soci che costituiscono l'Associazione Nazionale, le

estis asignitaj al DLF.
De 1970 ĝis 1990, la Dopolavoro Ferroviario spertis gravajn ŝanĝojn: pli granda sendependeco estis donita al la DLF-sekcioj, kiuj restis validaj ĝis 1995.
Tiuj estis la jaroj, en kiuj DLF estis multe plifortigita per grandaj investoj en sportejoj, klubaj sidejoj, kaj turismaj kaj distraj instalaĵoj.
La administrado de fervojaj kantinoj fare de DLF disetendiĝis preskaŭ ĉie, kun signifaj investoj en kantinajn konstruaĵojn kaj aliajn instalaĵojn. DLF administris la servon ĝis 2009.
La 10-an de majo 1995, la sindikatoj kaj FS SpA fondis la Nacian Asocion DLF. La transformo de DLF al Asocio jam okazis en la teritorio dum la reformo okazinta en 1972.
En 2000, *FS SpA* informis la Nacian Asocion de DLF, ke la posedaĵoj antaŭe uzitaj de DLF (sociaj sidejoj kaj distraj spacoj, sportaj instalaĵoj kaj verdaj areoj) iĝis konstrueblaj kaj ne plu estos donataj al DLF senpage, kiel kutimis dum la antaŭaj 75 jaroj.
Estis tre malfacila kaj, laŭ iuj aspektoj, drama tempo. Tuj ekestis la demando



kiel garantii al la lokaj DLF-Asocioj la haveblecon de la posedaĵoj, necesaj por plenumi siajn agadojn.
Fakte, ĉi tio estis la ĉefa postulo por la ekzisto kaj vivo de la *Dopolavoro Ferroviario*: sen socia sidejo kaj sportaj instalaĵoj, DLF devus fermiĝi. Evitante la riskon de vendo de aktivaĵoj, la Nacia Asocio decidis pagi regulajn lupagojn por la posedaĵoj kaj aĉeti parton de ili.
La *Dopolavoro Ferroviario* nuntempe konsistas el unu Nacia Asocio kaj 92 lokaj asocioj. La lokaj asocioj estas la

quali hanno come soci i ferrovieri in servizio e in pensione, i familiari dei ferrovieri e gli esterni alle FS (soci Frequentatori).

Il Dopolavoro Ferroviario ha oggi in dotazione un consistente patrimonio fatto di sedi sociali, di impianti sportivi, di spazi per le attività ricreative, di aree verdi e di strutture alberghiere, patrimonio che si trova oggi iscritto nello stato patrimoniale della Società RFI.

Esso è stato costituito nel tempo attraverso risorse delle sedi del Dopolavoro Ferroviario e dei soci, con investimenti propri dei DLF.

Si pone oggi la necessità, di realizzare una riforma degli statuti e dell'organizzazione DLF che tenga conto dei due principali fattori di cambiamento già intervenuti:

- il rafforzamento del DLF, avvenuto con la costituzione della Società Patrimonio DLF e l'acquisto di 53 strutture immobiliari. Oggi la "Patrimonio DLF" è una società con un capitale sociale interamente versato di 41 milioni di euro;
- la radicale riorganizzazione ferroviaria, che vede oggi un organico di circa 65.000 ferrovieri in luogo dei 220.000 degli anni '80 e dei 140.000 di quando nel 1995 è stata costituita l'Associazione.

Per questo gli Organi dell'Associazione Nazionale DLF hanno proposto ai Soci Fondatori un progetto di cambiamento e di trasformazione che ha come suo perno centrale la costituzione di una "Fondazione DLF". □

*(www.dlf.it)*

Roma - Historia sidejo de DLF - Sede storica DLF -




membroj de la Nacia Asocio, kiuj inter siaj membroj havas la nunajn kaj emeritajn fervojistojn, iliajn familianojn, kaj ne-FS-dungitojn (vizitantojn).

La *Dopolavoro Ferroviario* havas nuntempe grandan posedaĵaron, kiu enhavas asociajn sidejojn, sportejojn, distrajn spacojn, verdajn zonojn kaj hotelajn instalaĵojn, havaĵojn kiuj nun estas sur en la bilanco de la RFI-Kompanio.

Ĝi plifortiĝis intertempe dank' al rimedoj de la sidejoj kaj membroj de *Dopolavoro Ferroviario*, kun investoj de DLF.

Nun endsas efektivigi reformon de la statuto kaj organizado de DLF, kiu konsideru du ĉefajn ŝangfaktorojn, kiuj jam okazis:

DLF ASSOCIAZIONE NAZIONALE

Logotipo nacia DLF - logo DLF nazionale

- la plifortigo de DLF, kiu okazis per la instigo de la Entrepreno *Patrimonio DLF* kaj la aĉeto de 53 nemoveblaj strukturoj. Hodiaŭ, "Patrimonio DLF" estas entrepreno kun plene pagita akcia kapitalo de 41 milionoj da eŭroj;
- la radikala reorganizado de la fervojo, kiu nun dungas proksimume 65.000 fervojistojn, kompare kun 220.000 en la 1980-aj jaroj kaj 140.000, kiam la Asocio estis fondita en 1995.

Pro ĉi tiu kialo, al la Fondintaj Membroj la Organoj de la Nacia Asocio DLF proponis la projekton fokusitan sur la starigo de "DLF-Fondaĵo".

*(Trad: ViTo)*

Feliĉan Kristnaskajn festtagojn!
Buon Natale!



# Trieste-Belgrado in treno
# Triesto-Beogrado per trajno

La ferrovia dismessa da decenni potrebbe riannodare Trieste alla capitale serba.
Linea ferroviaria Trieste-Belgrado di nuovo in funzione? Si è svolto un incontro per lo studio per la possibile riattivazione dei collegamenti ferroviari passeggeri lungo la tratta Trieste - Lubiana - Zagabria - Belgrado. L'iniziativa si inserisce nel piano operativo congiunto tra Ince (Iniziativa Centro Europea) e Regione Friuli Venezia Giulia, volto a rafforzare la cooperazione regionale e favorire l'integrazione europea, e più in generale nell'azione a favore dell'allargamento dell'Ue nei Balcani occidentali.
Si tratta di un progetto inserito in quello più ampio riguardante il corridoio Balcani occidentali - Mediterraneo orientale, entrato da poco a far parte del sistema Ten-T europeo. Novità che aprirebbe importanti scenari di sviluppo legati al traffico su ferro, sia passeggeri che merci, lungo una tratta che è dismessa ormai da decenni. Parliamo, quindi, di riattivare una linea non operativa da decenni che potrebbe riannodare Trieste al suo originario retroterra. Senza dimenticare i vantaggi per tutta l'area soprattutto quando diverrà operativo il corridoio economico tra India-Medio oriente-Europa. Sostenere la connettività significa sostenere l'avvicinamento all'Ue e uno sviluppo condiviso. Il progetto, che vede coinvolti paesi Ue e extra Ue, rappresenta un esempio della missione di lungo periodo dell'Ince volta a superare barriere al fine di sviluppare la cooperazione e l'integrazione in Europa. Senza dimenticare che il trasporto ferroviario, sia passeggeri che merci, è riconosciuto come un pilastro strategico della transizione ecologica.□ *(TriestePrima)*


Centra Stacidomo -Trieste - Centrale

Fervojo forlasita dum jardekoj, povus rekonekti Trieston al la serba ĉefurbo.
Ĉu la fervoja linio Triesto-Beogrado denove ekfunkcios?
Kunveno okazis por studi la eblan reaktivigon de pasaĝeraj fervojaj konektoj laŭlonge de la itinero Triesto - Ljubljano - Zagrebo - Beogrado. La iniciato estas parto de la komuna operativa plano inter Ince (Centreŭropa Iniciato) kaj la Regiono Friulo - Venecio Julia, celanta fortigi regionan kunlaboron kaj antaŭenigi eŭropan integriĝon, kaj pli ĝenerale, en la klopodo subteni EU-vastiĝon en Okcidentaj Balkanoj.
Temas pri projekto, kiu estas parto de tiu pli larĝa rilate al la koridoro Okcidentaj Balkanoj - Orienta Mediteraneo, kiu ĵus fariĝis parto de la eŭropa TEN-T-sistemo. Novaĵo, kiu malfermus gravajn evoluajn ŝancojn por fervojaj trafikoj, kaj pasaĝeraj kaj varaj, laŭ itinero forlasita dum jardekoj. Ni parolas do pri reaktivigo de linio, kiu estis nefunkcianta dum jardekoj, kiu povus rekonekti Trieston al ĝia origina landinterno. Kaj kompreneble, la avantaĝoj por la tuta regiono, precipe kiam la Ekonomia Koridoro tra Hindio-Mezoriento-Eŭropo ekfunkcios.
Subteni konekteblecon signifas subteni pli proksimajn kunligojn kun EU kaj komunan disvolviĝon. La projekto, kiu kuntrenas EU- kaj ne-EU-landojn, estas ekzemplo de la longdaŭra misio de Ince superi barojn por disvolvi kunlaboron kaj integriĝon en Eŭropo.
Rimarkindas ankaŭ, ke fervoja transporto, ĉu pasaĝera ĉu vara, estas agnoskita kiel strategiero de la ekologia transiro.□

*(Trad: ViTo)*

# Il futuro del trasporto merci ferroviario in Serbia
# La estonteco de fervoja vartransporto en Serbio

La Serbia sta attuando una modernizzazione completa delle infrastrutture, con nuove tratte ferroviarie ad alta velocità e la costruzione di 2000 chilometri di binari prevista nei prossimi anni. Se ne è parlato a Belgrado il 31 ottobre 2024 durante la prima conferenza internazionale: “Trasporto merci ferroviario: Prospettive e Soluzioni”.
Alla conferenza hanno partecipato rappresentanti di operatori ferroviari e logistici, terminal intermodali, porti, proprietari di merci, nonché istituzioni governative e accademiche.
Attualmente la ferrovia rappresenta circa il 20% del trasporto merci totale in Serbia, con crescente interesse da parte di investitori nazionali e internazionali. La presenza di 17 operatori privati di trasporto merci su rotaia in Serbia, unita agli investimenti in corso nello sviluppo di terminal intermodali, all’apertura di nuove linee e ai progetti di miglioramento delle infrastrutture su larga scala, sottolinea il ruolo futuro delle ferrovie come spina dorsale dei sistemi di trasporto sostenibili.
- Queste alcune delle questioni importanti sotto analisi:
- Quali merci possono essere trasportate da e verso la Serbia in treno e a quali condizioni?
- Quali sono i risparmi in termini di costi ed emissioni quando si opta per il trasporto ferroviario?
- Quali sono le tratte più sviluppate oggi e quali acquisiranno slancio in futuro?
- Quali sono i vantaggi del trasporto intermodale e quali sono le esperienze dei clienti?
- Quali servizi offrono gli operatori ferroviari privati in Serbia?
- Quali azioni sta intraprendendo

Varstacio - Trieste - scalo merci



Serbio realigas ampleksan infrastruktur-modernigon, kun novaj rapidtrajnoj kaj konstruado de 2.000 kilometroj da trakoj planitaj por la venontaj jaroj. Ĉi tio estis diskutita ĉe la unua internacia konferenco en Beogrado la 31-an de oktobro 2024: “Fervoja Vartransporto: Perspektivoj kaj Solvoj”.
La konferencon partoprenis reprezentantoj de fervojaj kaj loĝistikaj firmaoj, intermodalaj terminaloj, havenoj, kargoposedantoj, same kiel registaraj kaj akademiaj institucioj.
Nuntempe la fervojo reprezentas proksimume 20% de la tuta vartransporto en Serbio, kun kreskanta intereso de internaj kaj internaciaj investantoj. La ĉeesto de 17 privataj fervojaj vartransportistoj en Serbio, kombinita kun nuntempaj investoj por la evoluo de intermodalaj terminaloj, la malfermo de novaj linioj kaj projektoj por plibonigoj de grandskalaj infrastrukturoj, substrekas la estontan rolon de fervojo kiel la spino de daŭripovaj transportsistemoj.
Jen kelkaj el la gravaj demandoj analizendaj:
- Kiujn varojn oni povas transporti al kaj de Serbio per trajno, kaj sub kiaj kondiĉoj?
- Kiaj estas la ŝparoj je kostoj kaj emisioj, se oni elektas fervojan transporton?
- Kiuj itineroj estas nuntempe plej evoluintaj kaj kiuj akiros elanon en la estonteco?
- Kiuj estas la avantaĝoj de intermodala transporto kaj kiaj estas la spertoj de la klientoj?
Kiujn servojn ofertas la privataj fervojaj firmaoj en Serbio?
- Kiujn agojn la registaro entreprenas

il governo per supportare lo sviluppo del trasporto merci ferroviario?

Il trasporto ferroviario in Serbia risale al 1884, con l'apertura della linea ferroviaria Belgrado-Niš. Nel 140° anniversario, il paese sta subendo una modernizzazione completa della sua infrastruttura, con la nuova tratta ferroviaria ad alta velocità da Novi Sad a Subotica, ma ci sono ancora progetti più grandi in vista, per la costruzione e la modernizzazione di nuovi binari in Serbia nei prossimi anni.□

*(trasporti-italia.com)*

por subteni la evoluon de la fervoja vartransporto?

La fervoja transporto en Serbio naskiĝis en 1884, per la inaŭguro de la fervoja linio Beogrado-Niš. Je sia 140-a datreveno, la lando travivas kompletan modernigon de sia infrastrukturo, kun la nova rapidlinio *Novi Sad-Subotica*. Tamen, estas ankoraŭ pli grandaj projektoj en la estonteco danke al la konstruado kaj modernigo de novaj trakoj en Serbio dum la venontaj jaroj.□

*(Trad: ViTo)*

# Il museo di Trieste Campo Marzio verso la riapertura
# Muzeo Triesto Campo Marzio baldaŭ remalfermiĝos

La stazione storica di Trieste Campo Marzio sarà il secondo importante museo nazionale ferroviario del Gruppo FS, dopo quello di Pietrarsa. Lo stabile, noto per la sua eleganza architettonica, sta progressivamente recuperando l'antico prestigio grazie all'intervento di riqualificazione promosso dalla Fondazione FS Italiane. L'investimento complessivo previsto è di circa 24,5 milioni di euro.

La stazione di Trieste Campo Marzio, inaugurata nel 1906 come capolinea della ferrovia Jesenice-Trieste, dopo la Seconda Guerra Mondiale perse progressivamente il traffico passeggeri e fu poi per decenni utilizzata solo per il traffico merci. Dal 1984 ospita il museo ferroviario, su iniziativa della locale sezione del Dopolavoro Ferroviario, dal 2018 è oggetto di riqualificazione per diventare il secondo grande museo nazionale del Gruppo FS, gestito dalla Fondazione FS.

Il progetto di restauro del museo di Trieste Campo Marzio mira alla rinascita architettonica del complesso con interventi ingegneristici di rilievo, come la ricostruzione della capriata in acciaio e vetro e la valorizzazione delle aree turi-

La historia stacio *Trieste Campo Marzio* estos la dua plej granda nacia fervoja muzeo de la FS Grupo (Ferrovie dello Stato, Ŝtataj Fervojoj), post Pietrarsa. La konstruaĵo, konata pro sia arkitektura eleganteco, iom post iom reakiras sian antaŭan prestiĝon danke al la renoviga projekto, kiun antaŭenigas *Fondazione FS Italiane*. La tuta investo antaŭvidas je proksimume 24,5 milionojn da eŭroj.

La stacio *Trieste Campo Marzio*, inaŭgurita en 1906 kiel finstacio de la fervojo Jesenice-Triesto, post la Dua Mondmilito iom post iom perdis pasaĝeran trafikon kaj poste dum jardekoj estis uzata nur por vartrafiko. Ekde 1984 ĝi gastigas fervojan muzeon, kiun fondis la loka sekcio de *Dopolavoro Ferroviario*. Ekde 2018 ĝi estas objekto de renoviga projekto por iĝi la dua plej granda nacia fervoj-muzeo.

La restaŭra projekto de la muzeo Triesto *Campo Marzio* celas revivigi la arkitekturon de la amplekso per signifaj inĝenieraj intervenoj, kiel ekzemple la rekonstruon de la ŝtala kaj vitra truso ĉarpenta kaj la plibonigon de la turismaj kaj gastaj areoj. Post prepara laboro, estas kompletigita la laboro pri la teg-

stiche-ricettive. Dopo le opere preliminari, sono stati completati i lavori su coperture e solai della testata Ottaviano Augusto, mentre il restauro della facciata mare è al 75% e i ponteggi saranno rimossi entro l'anno. Nell'ala Giulio Cesare si stanno concludendo le finiture interne e l'installazione degli impianti. La nuova struttura in acciaio e vetro sulla corte centrale ha già modificato il profilo della stazione.

La nuova copertura del museo sarà pronta entro il 2025 e includerà un bar ristorante panoramico. Nell'ala destra sorgerà un hotel a tema ferroviario con 60 camere. La collezione museale, composta da rotabili restaurati, cimeli e plastici sarà esposta nel piazzale e nelle sale adiacenti. Il piazzale avrà 4 binari (uno elettrificato) per accogliere treni storici di lusso come l'Orient Express, l'Arlecchino, ALe601 e il Settebello, attualmente in restauro.□

*(www.fsnews.it)*

mentoj kaj plankoj de la fina sekcio de *Ottaviano Augusto*, dum la restaŭrado de la marborda fasado estas 75% kompleta, kaj la skafaldaro estos forigota antaŭ la fino de la jaro. En la alo *Giulio Cesare* oni kompletigas la internajn garnaĵojn kaj la muntadon de instalaĵoj. La nova ŝtala kaj vitra strukturo super la centra korto jam ŝanĝis la profilon de la stacio.

La nova muzeo-tegmento pretos ĝis la fino de 2025 kaj inkluzivos panoraman trinkejon kaj restoracion. Hotelo je Fervoja temo, kun 60 ĉambroj, estos konstruota en la dekstra alo. La muzeokolekto enhavos restaŭritan trakveturilaron, memorindaĵojn kaj fervojajn maketojn, kaj troviĝos en la staciplaco kaj apudaj salonoj. La staciplaco havos kvar trakojn de kiuj -unu elektrizita- por bonvenigi historiajn luksajn trajnojn kiel la Orient-Ekspreso, la Arlekenon, la ALe601-on kaj la *Settebello*-n, kiun oni nutempe restaŭradas.□ *(trad: ViTo)*




Vizito al la muzeo dum la IFEF-kongreso en Triesto 2009
Visita al museo durante il congresso IFEF a Trieste nel 2009






Kiel aspektis - Come era



Kiel aspektos - Come sarà

# Breve storia del Museo Nazionale Ferroviario di Pietrarsa
# Mallonga historio de la Nacia Fervoja Muzeo de Pietrarsa

Il Museo Nazionale Ferroviario di Pietrarsa è un luogo unico in Italia, affacciato sul Golfo di Napoli, racchiude un pezzo significativo di storia del Paese. Le Officine borboniche di Pietrarsa furono fondate nel 1840 da Ferdinando II di Borbone come “Reale Opificio Meccanico, Pirotecnico e per le Locomotive”, poste accanto alla prima ferrovia in Italia, Napoli-Portici, inaugurata il 3 ottobre 1839.


Salono de Vaporlokomotivoj - Salone locomotive a vapore

Inizialmente impiegate nella produzione e riparazione di locomotive, le officine divennero presto il primo grande polo siderurgico-industriale italiano, con circa 700 operai già nel 1853.
Dopo l’Unità d’Italia, la gestione passò a privati fino al 1905, quando divennero parte delle Ferrovie dello Stato, specializzandosi in officina di manutenzione rotabili fino alla chiusura definitiva nel 1975. Già nel 1977 fu deciso di convertire i capannoni in museo ferroviario, che venne inaugurato il 7 ottobre 1989, in occasione del 150° anniversario della ferrovia italiana. Chiuso successivamente, fu riaperto il 19 dicembre 2007 dopo lavori di restauro.
Tra il 2014 e il 2017 sono stati effettuati ampi interventi di recupero, restaurando i padiglioni ottocenteschi,



La Pietrarsa Nacia Fervoja Muzeo estas unika loko en Italio, kun la vido al la Napola Golfo, kiu gardas gravan pecon de la ŝtathistorio. Ferdinando la 2-a de Borbono en la jaro 1840 fondis la Borbonajn Uzinojn de Pietrarsa kiel la "Reĝa Uzino Mekanika, Piroteknika kaj por Lokomotivoj ", kiu situis apud la unua fervojo de Italio, nome Napoli -Portici, inaŭgurita la 3-an de oktobro 1839.
Komence dediĉitaj al la produktado kaj riparado de lokomotivoj, la uzinoj baldaŭ fariĝis la unua plej grava ferindustria centro en Italio, kiu dungis ĉirkaŭ 700 laboristojn jam en 1853.
Post la Unuigo de Italio, la administrado iĝis privata ĝis 1905, kiam la Uzinoj iĝis ero de la Italaj Ŝtataj Fervojoj, kaj fakis pri bontenado de rulmaterialo ĝis sia fina fermo en 1975.
Jam en 1977, oni decidis transformi la konstruaĵojn en fervojan muzeon, inaŭguritan la 7-an de oktobro 1989, okaze de la 150-a datreveno de la itala fervojo.
Post fermo, ĝi remalfermis la 19-an de decembro 2007, post ampleksa restaŭrado.
Inter 2014 kaj 2017, okazis ampleksaj renovigoj, ekzemple restaŭro de la



creando un giardino mediterraneo e introducendo tecnologie moderne, cinema e centro congressi.
Costituito da sette padiglioni su una superficie di 36000 m², dei quali 14000 coperti, il museo ospita oltre 55 rotabili storici (locomotive a vapore, elettriche, diesel, carrozze anche reali) e centinaia di cimeli ferroviari.
Tra i pezzi più iconici: la ricostruzione della locomotiva Bayard/Vesuvio usata per la prima corsa Napoli-Portici, la fiammante Carrozza 10 del Treno Reale (Fiat 1929), plastici come "Trecentotreni" e padiglioni dalle strutture monumentali.
Pietrarsa rappresenta un simbolo della archeologia industriale italiana, esempio di valorizzazione del patrimonio ferroviario e industriale meridionale.
Oggi è anche un polo culturale multifunzionale: ospita eventi, congressi (fino a 3500 spettatori) e spettacoli all'aperto, oltre a coinvolgenti percorsi interattivi per tutte le età.
Il Museo di Pietrarsa racconta l'evoluzione delle ferrovie italiane in un contesto architettonico e tecnologico unico, tra Vesuvio e mare.□

*(www.fondazionefs.it)*

19-jarcentaj pavilonoj, kreo de la mediteranea ĝardeno, kaj enkonduko de modernaj teknologioj, kinejo kaj kongrescentro. La muzeo gastigas pli ol 55 historiajn rulmaterialojn (vaporajn, elektrajn kaj dizelajn lokomotivojn, inkluzive de reĝaj vagonoj) kaj centojn da fervojaj memorindaĵoj. Ĝi troviĝas en sep pavilonoj kies surfaco mesuras 36000 kvadratajn metrojn, el kiuj 14000 estas kovritaj.
Inter la plej ikonecaj pecoj: la rekonstruo de la lokomotivo Bayard / Vesuvio, uzita por la unua veturo Napoli-Portici, la flamanta Vagono 10 de la Reĝa Trajno (Fiat 1929), fervojmodeloj kiel "Trecentotreni", kaj pavilonoj kun monumentaj strukturoj.



Vagonaro de la unua veturo - vagoni del primo viaggio

Pietrarsa reprezentas simbolon de itala industria arkeologio, ekzemplon de valorigo de la fervoja kaj industria heredaĵo de suda Italio. Hodiaŭ ĝi estas ankaŭ multfunkcia kultura centro: ĝi gastigas eventojn, kongresojn (kun ĝis 3 500 spektantoj), kaj subĉielajn spektaklojn, kaj ankaŭ allogajn interagajn itinerojn por homoj de ĉiuj aĝoj.
La Pietrarsa Muzeo rakontas la evoluon de la italaj fervojoj en unika arkitektura kaj teknologia kunteksto, inter Vezuvio kaj la maro.□


Panoramo kun la muzeo kaj la Vezuvio en la fono - Panorama col museo e il Vesuvio sullo sfondo

# Che cos'è una funicolare? Come funziona?
# Kio estas funikularo? Kiel ĝi funkcias?

Una funicolare è una "ferrovia a fune": due vetture su rotaia, collegate da una stessa fune, si muovono in senso opposto lungo un pendio. È ideale in città e montagne con pendenze elevate, perché garantisce tempi certi, basso impatto energetico e ridotta occupazione di suolo.

**Come funziona la trazione?**

Il principio è abbastanza semplice. Un argano (cioè un motore) in stazione muove la fune traente a cui è collegato un sistema di vetture controbilanciate: una vettura sale "tirata" dalla fune, l'altra scende (contribuendo così a far salire l'altra). Avviamenti e fermate sono abbastanza dolci; freni di servizio e comandi automatici regolano la velocità e l'arresto.

**Perché si chiama "funicolare"?**

Deriva dal latino funiculus, "piccola fune": la fune metallica è infatti il cuore del sistema. Il nome richiama le origini ottocentesche degli impianti a fune, che prevedevano in molti casi l'impiego dell'acqua (prima del boom dell'elettrificazione): in questi impianti le vetture avevano serbatoi che venivano riempiti nella "fermata" a monte (per rendere la vettura più pesante nella fase di discesa e trascinare l'altra che era in fase di salita); una volta che la vettura giungeva a valle, i suoi serbatoi venivano svuotati.

Il tracciato può essere rettilineo o curvo, su binario singolo con raddoppio centrale o su doppio binario. Le funicolari affrontano pendenze oltre il 30–40%, che risultano impraticabili per i treni ordinari. Il movimento delle vetture è "guidato" nei binari grazie a un sistema di carrelli con ruote; pulegge e rulli lungo la linea sostengono e allineano la fune.



San Nazare, Portugalio

Funikularo (Ŝnurfervojo) estas kablofervojo": du fervojovagonoj, konektitaj per ununura kablo, moviĝas en kontraŭaj direktoj laŭlonge de deklivo.
Ĝi estas ideala por urboj kaj montoj kun krutaj deklivoj ĉar ĝi garantias precizajn vojaĝtempojn, malaltan energikonsumon kaj minimuman teruzon.

**Kiamaniere trakciado funkcias?**

La ideo estas sufiĉe simpla. Vinĉo (t.e. motoro) ĉe la stacio movas la trakcikablon, kiu estas konektita al sistemo de kontraŭpezaj vagonoj: unu vagono supreniras, "tirata" de la kablo, dum la alia malsupreniras (tiel helpante levi la alian). Starto kaj halto estas sufiĉe glataj; servobremsoj kaj aŭtomataj kontroloj reguligas rapidon kaj halton.

**Kial ĝi nomiĝas "funikularo"?**

Ĝi devenas de la latina funiculus, "malgranda ŝnuro": la metala kablo estas, fakte, la koro de la sistemo. La nomo aludas al la 19-jarcentaj originoj de ŝnuraj instalaĵoj, kiuj ofte uzis akvon (antaŭ la apero de elektro). En ĉi tiuj sistemoj, la vagonoj havis tankojn, kiujn oni plenigas ĉe la supra "haltejo" (por pezigi la vagonon dum la malsupreniro kaj treni la alian, kiu supreniras); post kiam la vagono atingas la malsupron, ĝiaj tankoj malpleniĝas.

La traceo povas esti rekta aŭ kurba, sur ununura trako kun centra duobligo aŭ sur duobla trako. Funikularoj trairas deklivojn superantajn 30–40%, kiuj ne estas traireblaj per kutimaj trajnoj.

La movado de la vagonoj estas "gvidata" laŭ la trakoj danke al sistemo de boĝioj kun radoj; pulioj kaj rulpremiloj laŭ la linio, kiu subtenas kaj enli-

Molte funicolari sono automatiche, con un operatore che supervisiona in stazione o a bordo; alcune operano con supervisione remota; sono rari i casi di guida manuale, che si limita principalmente alle fasi di manovra. La velocità si regola dall'argano tramite un inverter, con profili di marcia e limiti preimpostati (avvio, crociera, arrivo).
I freni di servizio agiscono sull'argano e sui carrelli; i freni d'emergenza, ridondanti ("pinze" che agiscono sulle rotaie o sulla fune), si attivano per eccesso di velocità (rilevata da sensori), perdita di tensione o allarmi.

**Funicolare, cremagliera, ascensore inclinato**

Spesso la funicolare viene confusa con la cremagliera o con l'ascensore inclinato: la cremagliera si distingue dalla funicolare per avere il motore a bordo e un pignone (una specie di ruota dentata) che ingrana su una "rotaia dentata": è un treno. L'ascensore inclinato ha spesso una sola cabina con contrappeso.
Il contro-bilanciamento rende la funicolare un sistema energeticamente efficiente: parte dell'energia richiesta per la trazione infatti viene ricavata dal trascinamento della cabina in discesa, mentre il motore dell'impianto provvede "al resto". Gli impianti moderni, inoltre, sono provvisti di sistemi per il recupero dell'energia in discesa (rigenerazione), di controlli precisi e profili di velocità ottimizzati che riducono consumi, rumore e usura.
In Italia ci sono funicolari a Napoli, a Bergamo (Alta–Bassa), sulla linea Como–Brunate, a Orvieto. All'estero sono abbastanza conosciute la Peak Tram (Hong Kong), la Stoosbahn (Svizzera, tra le più ripide), ascensores di Valparaíso (Cile), Bom Jesus a Braga (Portogallo). Si tratta di sistemi di mo-


Napoli Mergellina - Italio

niigas la kablon.
Multaj funikularoj estas aŭtomataj, do prizorganto superregas ĉe la stacio aŭ sur la vagoneto; kelkaj funkcias per teleregado je distanco; mana gvidado maloftas kaj celas ĉefe manovradon. Rapideco reguliĝas per la vinĉo pere de inversigilo, kun antaŭdifinitaj vojaĝprofiloj kaj limoj (starto, krozo, alveno).
La servobremsoj agas sur la vinĉon kaj la boĝiojn; la redundaj alarmbremsoj (krampoj, kiuj agas sur la reloj aŭ la kablo) aktiviĝas pro troa rapido (detektita de sensiloj), perdo da tensio aŭ alarmoj.

**Funikularo, dentorado, dekliva lifto**

Oni ofte konfuzas la funikularon kun dentorado aŭ kun dekliva lifto: la dentorado distingiĝas de la funikularo per tio, ke ĝi havas propran motoron kaj pinjonon (tipo de dentorado), kiu kluĉas kun "dentita relo": ĝi estas trajno. La dekliva lifto ofte havas unuopan kabinon kun kontraŭpezo.
La kontraŭbalancado igas la funikularon energiefika sistemo: parto de la energio bezonata por trakciado akiriĝas per tirado de la kabino malsupriranten, dum la motoro de la instalaĵo provizas la reston. Krome, modernaj instalaĵoj estas ekipitaj per energi-rekuperaj sistemoj dum malsupreniroj, precizaj kontroloj kaj optimumigitaj rapidprofiloj, kiuj malaltigas fuelkonsumon, bruon kaj eluziĝon.
En Italio, ekzistas funikularoj en Napolo, *Bergamo (Alta-Bassa*), sur la linio *Como-Brunate* kaj en *Orvieto*. Eksterlande estas bone konataj: La *Peak Tram* (Honkongo), la *Stoosbahn* (Svislando, inter la plej krutaj), la *ascensores en Valparaíso* (Ĉilio), kaj *Bom Jesus en Braga* (Portugalio).
Temas pri ĉiutagaj moveblecaj sistemoj,

bilità quotidiana diventati essi stessi, nella maggior parte dei casi, attrazioni turistiche.

## Le Funicolari di Napoli: il cuore del trasporto urbano verticale

Napoli è una città costruita tra mare e colline, con quartieri che si arrampicano sul tufo e strade che sembrano sfidare la gravità. In questo scenario unico, le funicolari rappresentano da oltre un secolo uno degli elementi più caratteristici e affascinanti della mobilità cittadina. Non sono solo mezzi di trasporto: sono veri e propri simboli dell'identità partenopea.

Napoli è l'unica città italiana a contare ben quattro linee funicolari urbane:
Funicolare Centrale (1928), la più importante per traffico, collega via Toledo con il Vomero in pochi minuti.
Funicolare di Chiaia (1889), la più antica ancora in funzione, unisce la zona di Piazza Amedeo al cuore del Vomero.
Funicolare di Montesanto (1891), storicamente legata ai pendolari che salgono dal centro storico fino al quartiere collinare.
Funicolare di Mergellina (1931), meno frequentata, ma scenograficamente suggestiva per il collegamento tra il lungomare e Posillipo.



Teknikaj informoj pri la funikularo

In totale, trasportano decine di milioni di passeggeri all'anno, dimostrando come siano ancora oggi infrastrutture vitali.

Le prime funicolari nacquero alla fine dell'Ottocento, quando la città iniziava a espandersi verso l'alto. All'epoca erano mosse a vapore; in seguito furono elettrificate e modernizzate. La Funicolare Centrale, inaugurata negli anni '20, segnò una svolta: grazie a gallerie scavate nel tufo, collegava rapidamente la "città bassa" con la collina residenziale del Vomero, diventata in

kiuj ofte iĝis turismaj allogaĵoj.

## La Funikularoj de Napolo: la koro de vertikala urba transportado

Napolo estas urbo, konstruita inter la maro kaj la montetoj, kun kvartaloj grimpantaj al la tufa roko kaj stratoj, kiuj ŝajnas maltimi graviton. En ĉi tiu unika loko, funikularoj estis unu el la plej karakterizaj kaj fascinaj eroj de urba movebleco dum pli ol jarcento. Ili ne estas nur transportiloj: ili estas veraj simboloj de napola identeco.

Napolo estas la sola itala urbo kun kvar urbaj funikularlinioj:
Centra Funikularo (1928), la plej grava laŭ trafiko, kunligas *Via Toledo-n* kun *Vomero* je nur kelkaj minutoj.
*Chiaia* Funikularo (1889), la plej malnova ankoraŭ funkcianta, kunligas la areon de Placo Amedeo al la koro de kvartalo Vomero.
*Montesanto* Funikularo (1891), historie ligita al navedantoj, suprenirantaj de la historia centro al la montetopinta kvartalo.
*Mergellina* Funikularo (1931), malpli vizitata sed pejzaĝe fascina pro sia kunligo inter la marbordo kaj kvartalo Posillipo.

Entute, ili transportas dekojn da milionoj da pasaĝeroj ĉiujare, montrante, ke ili estas infrastrukturoj ankoraŭ viglaj hodiaŭ.

La unuaj funikularoj estis konstruitaj fine de la 19-a jarcento, kiam la urbo komencis disetendiĝi supren. Tiutempe ili moviĝis per vaporo; ili poste estis elektrizitaj kaj modernigitaj. La Centra Funikularo, inaŭgurita en la 1920-aj jaroj, markis turnopunkton: danke al tuneloj boritaj en la tufo, ĝi kunligis rapide la "malsupran urbon" al la loĝmonteto *Vomero*, kiu rapide fariĝis unu el la plej

breve uno dei quartieri più eleganti.
Oggi, nonostante abbiano superato il secolo di vita, le funicolari sono continuamente sottoposte a interventi di ammodernamento per rispondere agli standard di sicurezza e comfort.
Salire su una funicolare a Napoli non è solo un modo rapido per spostarsi: è un'esperienza. Dai finestrini si aprono squarci panoramici sulla città, dal blu del Golfo alle strade brulicanti di vita. Allo stesso tempo, si attraversa un pezzo di storia, perché ogni fermata custodisce frammenti di vita quotidiana, tradizioni popolari e ricordi cinematografici (celebre la canzone "Funiculì Funiculà", scritta per la funicolare del Vesuvio, oggi non più in funzione).
Il Comune di Napoli e l'ANM (Azienda Napoletana Mobilità) stanno lavorando a progetti di manutenzione straordinaria e rinnovamento dei convogli, con l'obiettivo di rendere le funicolari sempre più efficienti e integrate con la rete metropolitana. In un contesto urbano complesso come quello partenopeo, rappresentano un modello di trasporto sostenibile, rapido e sicuro.□

*(www.focus.it/cultura)*



Napoli Montesanto

elegantaj kvartaloj.
Hodiaŭ, post jarcento da funkciado, la funikularoj estas regule modernigataj celante plenumi sekurecajn kaj komfortajn stadartojn.
Veturi per funikularo en Napolo estas pli ol nur rapida maniero moviĝi: ĝi estas sperto. La fenestroj ofertas panoramajn vidojn de la urbo, de la blua Golfo ĝis la bruaj stratoj. Samtempe, oni trairas pecon de historio, ĉar ĉiu haltejo enhavas erojn de ĉiutaga vivo, popularajn tradiciojn kaj kinmemorojn (famkonatas la kanto "Funiculì Funiculà", verkita pri la funikularo de Vezuvio, nun ne plu funkcianta).
La Urbo Napolo kaj la ANM (*Azienda Napoletana Mobilità*) okupiĝas pri projektoj de eksterordinara bontenado kaj renovigo de veturiloj, celante igi la funikularojn pli kaj pli efikaj kaj integritaj kun la metroa reto. En ampleksa Napola urba kunteksto, ili reprezentas modelon de daŭripova, rapida kaj sekura transportado.□

*(Trad: ViTo)*



Napoli Mergellina malnova trajneto kaj malsupra enirejo



## Lo sapevi?

### La Ferrovia Brennan

fu un tipo di monorotaia, inventata all'inizio del XX secolo da Louis Brennan, in cui i veicoli stabilizzati attivamente mediante giroscopi, si spostavano su una singola rotaia Vignoles mediante ruote a doppia flangia.



Venne realizzato nel 1910 un modello in misura ridotta come anche un modello dimostrativo di dimensioni reali a Whitecity (Londra). Vi è stato anche un tentativo di introdurre in Germania questo tipo di trasporto su rotaia, per il quale si impegnarono il noto editore berlinese August Scherl e il consigliere federale del circondario degli Alti Tauni, il cavaliere Von Marx. Il progetto monorotaia alle pendici dei Tauni tuttavia fu interrotto ancora prima di una decisione e ulteriori progetti non ve ne furono.

Bernhard Kellermann immortalò una tale ferrovia nel suo romanzo fantascientifico Il tunnel sotto l'oceano (Der Tunnel) del 1913.

**Le due ruote equilibrate del carro giroscopico**

L'estremità dell'asse (C) corrisponde alla punta della trottola. Se, percorrendo una curva, la carrozzeria (F) iniziasse a inclinarsi verso sinistra, il segmento sporgente (G) si solleverebbe e toccherebbe l'asse (C) del bilanciere destro. Il bilanciere tenderebbe quindi a sollevarsi formando un angolo retto con G, proprio come una trottola tende a sollevarsi formando un angolo retto con la superficie su cui ruota. Questa azione contrasterebbe la tendenza all'inclinazione della carrozzeria e ripristinerebbe l'equilibrio del carro.

## *Cu vi sciis?*

### La Fervojo *Brennan*

Inventita en la frua XX jc. de *Louis Brennan*, la unurela Fervojo *Brennan* inkluzivis la veturilojn kiuj aktive stabiliĝas per giroskopoj kaj moviĝis laŭ la Vignoles-speca relo per duobla radflanĝo. En 1910 oni realigis la modelon je reduktita grando kaj ankaŭ demonstran ekzempleron je reala grando, elprovitan ĉe *Whitecity* en Londono. Oni provis enkonduki tiun specon de fervoja transporto en Germanio, engaĝante *August Scherl* la konatan eldoniston el Berlino kaj la kavaliron *Marks*, la Federacian Konsilanton de la distrikto Altaj Taunoj. La unurela projekto sur la deklivoj de Taunoj estis tamen interrompita kaj ne plu aperis projektoj.

*Bernhard Kellermann* senmortigis tian fervojon en sia scienca-fikcia romano "La tunelo sub la oceano" (*Der Tunnel*) en 1913.

**La du ekvilibraj radoj de la giroskopo**

La akso-fino (C) respondas al la ŝpinpinto. Se, turnante kurbon, la veturilo (F) komencus kliniĝi maldekstren, la elstaranta segmento (G) leviĝus kaj tuŝante la akson (C) de la dekstra balancirado. La balancirado tiam emus leviĝi ortangule kun G, same kiel ŝpinpinto emas leviĝi ortangule kun la surfaco, sur kiu ĝi turniĝas. Ĉi tiu ago kontraŭagos la kliniĝan tendencon de la veturilo kaj restarigos la ekvilibron de la veturilo.



## GRANDE STORIA DEL MARE

Il piroscafo SS Warrimoo stava navigando nel Pacifico centrale, da Vancouver, Canada, all'Australia.
Il 31 dicembre 1899, la nave si trovava in Latitudine 0º 31' Nord e Longitudine 179 30' Ovest, vicino all'intersezione dell'Equatore e della Linea Internazionale del Cambio di Data. Il capitano Phillips decise di posizionare la nave esattamente su quel punto a mezzanotte. Così, la prua della nave era nell'emisfero sud, in estate, il 1 gennaio 1900, mentre la poppa era nell'emisfero nord, in inverno, e nel 31 dicembre 1899.
La nave era contemporaneamente in due giorni, due mesi, due anni, due stagioni e due secoli diversi!
L'evento può essere di nessun valore nautico, anche perché con gli strumenti dell'epoca lai posizione poteva non essere precisa. Ma non è importante … quello che conta fu l'idea di quel comandante, abile e un po' burlone.

## GRANDA MARHISTORIO

La vaporŝipo *SS Warrimoo* navigadis en la centra Pacifiko, de Vankuvero, Kanado, al Aŭstralio. La 31-an de decembro 1899, la ŝipo estis je Latitudo 0º 31' Norde kaj Longitudo 179º 30' Okcidente, proksime al la interkruciĝo de la Ekvatoro kaj la Internacia Datlinio.
Kapitano *Phillips* decidis haltigi la ŝipon ĝuste je tiu punkto je noktomezo. Tiel, la la ŝippruo estis en la suda hemisfero, somere, la 1-an de januaro 1900, dum la pobo estis en la norda hemisfero, vintre, kaj la 31-an de decembro 1899.
La ŝipo estis samtempe en du malsamaj tagoj, du malsamaj monatoj, du malsamaj jaroj, du malsamaj sezonoj, kaj du malsamaj jarcentoj!
La evento eble ne havas naŭtikan signifon, precipe ĉar la situo eble ne precizis laŭ la iloj de tiu tempo. Sed tio ne gravas... kio gravis estis la ideo de tiu lerta kaj iom ŝercema ŝipestro.







## SOMMERGIBILE NUCLEARE

Intorno alla fine degli anni sessanta fu brevettato un gigantesco sommergibile cargo, a propulsione atomica, lungo più di 400 metri, che poteva trasportare 100 vagoni merci ferroviari disposti su quattro binari interni.

L'equipaggio era composto di sole sei/otto persone.

## NUKLEA SUBMARŜIPO

Je la fino de la 1960-aj jaroj, estis patentita giganta nuklea kargo-submarŝipo. Ĝi estis pli ol 400 metrojn longa kaj povis transporti 100 fervojajn varvagonojn lokigitajn sur kvar internaj reloj.

La ŝipanaro de la kargo submarŝipo havis nur ses-ok homojn.



# Il Culto dell'Autobus - La Kulto pri Aŭtobuso

## LINEA BUS 771: ATTRAVERSANDO IL QUARTIERE TRULLO

La linea 771 parte attraversando i palazzi in vetro del quartiere Eur, in una sorta di esposizione di questo luogo. Il capolinea di partenza è da viale America, all'ombra delle torri dell'architetto Ligini, alti palazzi moderni recentemente ristrutturati. Dalla partenza si scorgono il Fungo (torre



dell'acquedotto) e l'adiacente Palasport. Si attraversa via Cristoforo Colombo, osservando il palazzo dell'Hilton e la Nuvola di Fuksas, rispettivamente in vetro scuro e in vetro chiaro. Elegante viale Europa, alberato coi suoi negozi, e le persone sul mezzo sono poche, siamo intorno all'ora di pranzo e nel mese di luglio. Dopo tutto viale Europa, e altro vetro, avviene una svolta che ci mostra, per lasciare il quartiere, il Palazzo della Civiltà Italiana, anche detto "Colosseo quadrato", maestoso e rivestito di bianco travertino. Il bus, quindi, si allontana dall'Eur, fino a salire su un lungo viadotto che è il viadotto della Magliana, sopraelevato, inizialmente su campi da calcetto, da padel e da tennis, e poi, scorrendo l'autobus, su autodemolizioni e rivendite di materiali edilizi. Il viadotto scorre e si attraversa il fiume Tevere, ricco di vegetazione verde sulle due sponde. Si esce dal traffico scorrevole del viadotto per recarsi, a seguito di più svincoli e precedenze e cur-




Mappa itinerario - mapo itinero

## BUSLINIO 771: TRAIRANTE LA *TRULLO*-KVARTALON

La linio 771 komenciĝas per trairo tra la vitraj konstruaĵoj de la kvartalo EUR en Romo, kvazaŭ ĝia montrofenestro. La kapstacio estas en *Viale* (Aleo) *America*, en la ombro de la turoj disegnitaj/ konstruitaj de la arkitekto *Ligini*, alta, ĵus renovigitaj, modernaj konstruaĵoj. De la deirpunkto, oni povas vidi la tielnomatan "Fungon", kiu estas akvodukta Turo kaj la apudan sportarenon "*Palasport*". Oni transiras straton *Cristoforo Colombo*, observante la hotelon "*Hilton*" kaj la "Nubon" de la arkitekto *Fuksas*, konstruitajn respektive el malhela kaj hela vitro. Eleganta *Viale Europa*, borderita de arboj kaj butikoj, dum ene de la buso homoj malmultas; estas ĉirkaŭ tagmezo en julio. Post tio tra *Viale Europa*, kaj pli da vitro, estas turniĝo, kiu malkaŝas, dum ni forlasas la kvartalon, la Palacon de la *Civiltà Italiana*, ankaŭ konatan kiel la "*Kvadrata Koloseo*", majesta kaj vestita per blanka travertino. La buso poste moviĝas for de EUR, kaj ĝi supreniras longan viadukton, la Viadukton *Magliana*. Ĉi tiu levita itinero komence preterpasas futbalkampojn, padeltenisejojn kaj tenisejojn, kaj poste, dum la buso preterpasas, aŭtovrakigistojn kaj konstrumaterialajn vendeĵojn. La viadukto etendiĝas laŭlonge kaj transiras la riveron Tiberon, riĉa je verdaĵoj ambaŭflanke. La buso forlasas la trafikfluon sur la viadukto kaj, post pluraj kruciĝoj, vojrajtaj signoj kaj kurboj, atingas la komencon de *Via del Trullo*, kun ĝiaj elstaraj kazernoj kaj flankaj muroj.

La sama vojo poste atingas la kvartalon *Trullo*-n, kun aŭtoj parkitaj hazarde ambaŭflanke de la strato,

ve, all’inizio di via del Trullo, con un’importante caserma e muri laterali.
La stessa strada quindi giunge al quartiere denominato Trullo, auto parcheggiate non troppo in ordine ai due lati della strada, su cui offrono il loro spazio dei marciapiedi che invitano a bar e negozi, e persone che




vivono il luogo. L’autobus cammina più lentamente a causa di altri mezzi, di semafori pedonali, di pedoni del Trullo. Dal finestrino si scorgono le vecchie palazzine raggruppate intorno a giardinetti e muretti, e i fianchi di tali edifici sono colorati con grandi artistici murales. Su un angolo, i volti e le citazioni di Alberto Sordi e Gigi Proietti, celebri attori di Roma e della romanità. Ancora così per qualche chilometro, e l’autobus svolta su via Portuense, per allontanarsi ancora.
La carreggiata è più spaziosa, la strada offre salite e discese lungo cui continua la città, le insegne più diverse e le auto nelle svariate direzioni. Al cambio di strada il bus viaggia sempre tra curve, ci sono terreni ai due lati, fino a scorgere in lontananza il grande palazzo del Corviale, famoso per essere lungo fino a un chilometro.
Passando sotto a una ferrovia, si giunge alla fermata dell’Ospedale di San Giovanni Battista, dove scendono due signore anziane, aiutate da un altro adulto, che le accompagna. Inizia un giro tra uffici e alberghi, edifici della seconda metà del Novecento, sedi di aziende su rotatorie e cordoli; il capolinea è chiamato “Viola”, tra vetri di altri palazzi.□

*Alessandro D’Elia*

laŭflankita de trotuaroj, kiuj invitas al trinkejoj kaj butikoj kaj aperas loĝantoj. La buso moviĝas pli malrapide pro aliaj veturiloj, trafiklumoj por piedirantoj kaj la piedirantoj de *Trullo*. Tra la fenestreto, oni povas vidi la malnovajn konstruaĵojn grupigitajn ĉirkaŭ malgrandaj ĝardenoj kaj muretoj, kaj la flankoj de ĉi tiuj konstruaĵoj estas pentritaj per grandaj, artaj murpentraĵoj. Sur unu angulo, la vizaĝoj kaj citaĵoj de *Alberto Sordi* kaj *Gigi Proietti*, famaj aktoroj de Romo kaj de romeco. Tio daŭras kelkajn kilometrojn, kaj la buso turniĝas al *Via Portuense*, por forveturi eĉ pli.
La strato estas pli larĝa kaj ofertas suprenirojn kaj malsuprenirojn, laŭ kiuj la urbo daŭras, kun vasta gamo da ŝildoj kaj aŭtoj en diversaj direktoj. Ĉe la ŝanĝo de itinero, la buso daŭre serpentumas tra kurboj, kun multaj aŭtoj ambaŭflanke, ĝis oni ekvidas la grandan konstruaĵon *Corviale* en la distanco, fama ĉar ĝi longas ĉirkaŭ unu kilometron. Pasante sub fervojan linion, oni atingas la haltejon de la Hospitalo *San Giovanni Battista*, kie eliras du maljunaj virinoj, helpataj de alia plenkreskulo, kiu akompanas ilin. Komenciĝas rondiro, preterpasante oficejajn konstruaĵojn kaj hotelojn, konstruaĵojn el la dua duono de la dudeka jarcento kaj sidejojn de firmaoj sur trafikcirkloj kaj trotuarbordoj, kaj la finstacio nomiĝas "*Viola*", ĉirkaŭe aliaj vitraj konstruaĵoj.□

*Alessandro D’Elia*



La kvadrata Koloseo - EUR - Il Colosseo quadrato

# IL TRENO SU GOMMA MICHELINE
# LA PNEŬMATIKA TRAJNO "MICHELINE"

Il "treno su gomma" Micheline fu un progetto innovativo degli anni '30 sviluppato dalla società francese Michelin. Ideato per unire i vantaggi del trasporto ferroviario alla tecnologia degli pneumatici in gomma, il Micheline montava ruote pneumatiche, offrendo un viaggio più silenzioso e confortevole rispetto ai treni tradizionali su ruote d'acciaio. Questo sistema, che utilizzava motori leggeri montati su carrozze aerodinamiche, fu testato in Francia e in altri Paesi, ma non ebbe larga diffusione per via dei costi di manutenzione e delle limitazioni di carico. Tuttavia, il Micheline segnò un importante passo avanti nella sperimentazione ferroviaria e nella ricerca sui materiali.
In Italia, il treno su gomma Micheline fu adottato in alcune regioni, in particolare in Piemonte, Toscana e Lombardia, su linee minori o turistiche, grazie al suo comfort e alla ridotta rumorosità. Tuttavia, il sistema incontrò presto limiti pratici. Gli pneumatici, pur offrendo un viaggio più confortevole, avevano una durata inferiore rispetto alle ruote in acciaio e richiedevano frequenti sostituzioni, con costi elevati di manutenzione. Inoltre, le gomme non sopportavano bene il peso di treni più lunghi o carichi pesanti, limitando la capacità di trasporto e rendendo il Micheline poco competitivo rispetto ai treni tradizionali. Di conseguenza, il Micheline scomparve progressivamente a favore delle linee ferroviarie classiche.□




La "pneŭmatika trajno" *Micheline* estis noviga projekto, kiu naskiĝis en la 1930-aj jaroj en la franca firmao *Michelin*. Dizajnita celante kombini la avantaĝojn de fervoja transporto kun kaŭĉuka pneŭmatika teknologio, la *Micheline* estis ekipita per pneŭmatikoj kaj ofertis pli trankvilan kaj pli komfortan veturon kompare kun tradiciaj ŝtalradaj trajnoj. Ĝi uzis malpezajn motorojn muntitajn sur aerodinamikaj vagonoj kaj estis testita en Francio kaj aliaj landoj, tamen ne estis vaste adoptita pro altaj kostoj de bontenado kaj ŝarĝlimigoj. Tamen, la Micheline markis gravan paŝon antaŭen en fervoja eksperimentado kaj materialesplorado.
En Italio, la pneŭmatika trajno *Micheline* estis uzita en kelkaj regionoj, precipe en Piemonto, Toskanio kaj Lombardio, sur malgrandaj aŭ turismaj linioj, danke al sia komforto kaj reduktita bruo. Tamen, la sistemo baldaŭ alfrontis praktikajn limigojn. Kvankam pneŭmatikoj ofertis pli komfortan veturadon, ili havis pli mallongan vivdaŭron ol ŝtalradoj kaj postulis oftan anstataŭigon, altigante bontenadajn kostojn. Krome, la pneŭmatikoj ne bone eltenis la pezon de pli longaj trajnoj aŭ pezaj ŝarĝoj; ĉi tio limigis ilian ŝarĝkapaciton kaj igis la *Micheline-n* malpli konkurenca kompare kun tradiciaj trajnoj. Rezulte, la *Micheline* iom post iom malaperis favore al tradiciaj fervojaj linioj.□



# Vita dell'IFEA

Cari amici e soci IFEA,
La seconda metà del 2025 ha visto la maggior parte delle attività concentrarsi sugli incontri in rete con l'Estraro dell'IFEF e, in alcune occasioni, con i membri del "LKK" del prossimo congresso.
Dal 2 al 4 settembre ho partecipato, in qualità di delegato IFEF, all'assemblea annuale della FISAIC tenutasi a Caserta. L'IFEF, in quanto membro effettivo della Federazione internazionale dei dopolavoro ferroviari, partecipa di pari grado alle decisioni assembleari.
Il 27 novembre ho preso parte all'assemblea annuale del DLF di Bologna. Il tema principale, oltre all'approvazione del Bilancio Preventivo 2026, è stato la cessione del parco. Infatti, a seguito di un atto di vendita tra FS Sistemi Urbani e il Comune di Bologna, l'area verde è passata in proprietà comunale. Al DLF sono rimaste la palazzina sede sociale e le altre strutture che ospitano i gruppi culturali. Nonostante questo ridimensionamento, il direttivo del DLF-BO si è impegnato a garantire la continuità dell'attività sociale e ludica a favore dei ferrovieri. Il congresso IFEF 2026 sta prendendo forma: informazioni, programma e aliĝilo sono disponibili online sulle pagine www.ifef.net e eventaservo.org. Invitiamo tutti, ferrovieri e amici delle ferrovie, a partecipare!□

*Vito Tornillo*




Martin e membri IFEF al IFK a Herzberg am Harz

**Ni invitas vin al la 77-a IFK en Serbio**
Gli amici e colleghi esperantisti serbi sono lieti di invitarvi al congresso che si terrà a Belgrado e Mokra Gora, dal 23 al 30 maggio 2026. **Belgrado** è il luogo dove il congresso avrà inizio: una città dalla storia millenaria e dallo spirito instancabile, che vanta innumerevoli punti di interesse, frutto di epoche, popoli e culture diverse. A **Mokra Gora**, invece, si trova la Ŝargana Osmica, una delle ferrovie turistiche e museali più note d'Europa. La sua costruzione unica e il suo grande significato storico la rendono una meta imperdibile per tutti gli appassionati di ferrovie e di paesaggi naturali.




Il nostro IFEF-Membro Onorario, amico e collega **Martin Stuppnig** ha festeggiato i suoi 100 anni!
Nato il 24 ottobre 1925 in Austria, Martin ha dedicato la sua intera esistenza a due grandi passioni e impegni: la ferrovia e l'Esperanto.
Per tutta la vita, Martin è rimasto fedele al mondo ferroviario. È stato attivo nell'Associazione dei ferrovieri esperantisti austriaci e nell'IFEF. Il suo contributo è stato riconosciuto nel 2008, quando è stato nominato Honora Membro (Membro Onorario) dell'IFEF.
La vita di Martin è stata segnata anche da eventi storici drammatici: A soli 17 anni, durante la Seconda Guerra Mondiale, in divisa tedesca, Martin visse la tragica esperienza dei bombardamenti su Monte Cassino e la successiva prigionia in Africa.
Di questa brutta avventura, ha lasciato una toccante testimonianza scritta nel suo libro, intitolato "Home en senhomeco".
L'IFEF, gli amici e i colleghi augurano a Martin ogni bene per altri 100 anni!

# ASSEMBLEA GENERALE FISAIC 2025
# ĜENERALA ASEMBLEO DE FISAIC 2025

L'Assemblea Generale FISAIC si è tenuta a Caserta, Italia, dal 4 al 7 settembre 2025.

Hanno partecipato 45 persone dei 14 paesi membri FISAIC: Austria, Belgio, Bulgaria, Repubblica Ceca, Danimarca, Francia, Germania, Grecia, Ungheria, Italia, Lussemburgo, Polonia, Romania, Svizzera; e anche il Presidente della FIRAC (Fédération Internationale des Radio Amateurs Cheminots) e il Segretario Generale dell'IFEF.




I rappresentanti dei paesi membri FISAIC hanno presentato le attività dei loro membri e dei gruppi effettuate durante l'anno scorso. Sono stati presentati anche i nuovi eventi in programma per i prossimi anni.

I lavori dell'Assemblea generale annuale si sono conclusi con l'approvazione del protocollo e un arrivederci alla prossima assemblea prevista per settembre 2026 a Craiova, Romania.

Un grazie agli organizzatori (FIRAC) dell'Assemblea Generale, in particolare a Dorina Piscopo che ha lavorato in modo che tutto andasse per il meglio, gestendo anche gli imprevisti dell'ultimo momento.

Durante la cena di chiusura sono state consegnate le onorificenze, come membri onorari a Vladislav Vocoun (Repubblica Ceca) e Barbara Sciesinski (Germania).

Oltre alla parte istituzionale hanno preparato visite culturali in luoghi speciali per tutti i partecipanti.

La prima visita è stata all'Anfiteatro Campano di Santa Maria Capua Vetere. Esso è il secondo più grande anfiteatro dopo il Colosseo. Fu probabilmente il

La Ĝenerala Asembleo de FISAIC *(Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots)* okazis en Kaserto, Italio, de la 4a ĝis la 7a de Septembro 2025.

Ĉeestis kvardek kvin homoj el la 14 membrolandoj de FISAIC:
Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥio, Danio, Francio, Germanio, Grekio, Hungario, Italio, Luksemburgo, Pollando, Rumanio kaj Svislando; krome la Prezidanto de FIRAC (*Fédération Internationale des Radio Amateurs Cheminots*) kaj la Sekretario de IFEF.

Ĉiuj reprezentantoj de la membrolandoj de FISAIC prezentis la agadojn de siaj membroj kaj grupoj faritajn dum la pasinta jaro. Ankaŭ estis prezentitaj la eventoj planitaj por la venontaj jaroj.

La procedoj de la Jara Ĝenerala Asembleo finiĝis per la aprobo de la protokolo kaj ĝisrevido dum la sekva asembleo planita en septembro 2026 en *Craiova*, Rumanio.

Dankon al la organizantoj (FIRAC) de la Ĝenerala Asembleo, precipe al *Dorina Piscopo*, kiu senlace laboris por ke ĉio iru glate, eĉ okaze de lastminutaj neatenditaj problemetoj.

Dum la ferma vespermanĝo, *Vladislav Vocoun* (Ĉeĥio) kaj *Barbara Sciesinski* (Germanio) ricevis atestilojn de honora membreco.

Aldone al la institucia parto, ili preparis kulturajn vizitojn al specialaj lokoj por ĉiuj partoprenantoj.

La unua vizito estis al la Kampania Amfiteatro en *Santa Maria Capua Vetere*, la dua plej granda amfiteatro post la Koloseo. Ĝi estis verŝajne la unua kon-

primo anfiteatro costruito dai Romani e forse modello per esso, fu anche il luogo della prima scuola di gladiatori. Annesso all'anfiteatro si trova il Museo dei Gladiatori.

La seconda visita è stata al Museo Nazionale Ferroviario di Pietrarsa (Napoli).




Il museo ha sede negli edifici delle ex-officine borboniche, dove furono montate la prime locomotive italiane.

In questo luogo è nata la storia delle ferrovie italiane. *(vedi articolo pag.18)*

Nel programma non poteva mancare quello che in Italia è una eccellenza: il cibo.

Infatti in questi tre giorni è stato possibile degustare alcuni dei piatti tipici della regione, iniziando dalla pizza napoletana, mozzarella, piatti a base di pesce e dolci locali.

Sicuramente per tutti i partecipanti sono stati dei giorni molto piacevoli, alcuni hanno proseguito il soggiorno in altre località della regioni: Napoli, Ischia, Costiera Amalfitana ecc. Grazie a tutti i partecipanti e agli organizzatori! *(ViTo)*

struita de la Romianoj, kaj eble modelo por la Koloseo mem. Ĝi estis ankaŭ la loko de la unua gladiatora lernejo. Aneksita al la amfiteatro estas la Gladiatora Muzeo.

La dua vizito estis al la Nacia Fervoja Muzeo en *Pietrarsa* (Napolo).

La muzeo estas lokita en la konstruaĵoj de la iamaj borbonaj metiejoj, kie la unuaj italaj lokomotivoj estis kunmetitaj.

Tie naskiĝis la historio de la italaj fervojoj. *(rigardu artikolon je paĝ. 18)*

La programo ne povis ne enhavi tion, kio estas konsiderata itala plejboneco: manĝaĵojn.

Efektive, dum ĉi tiuj tri tagoj, vizitantoj povis gustumi kelkajn el la tipaj pladoj de la regiono, komencante per napola pico, mocarelo, fiŝaĵoj kaj lokaj desertoj.

Sendube tio estis tre agrabla sperto por ĉiuj partoprenantoj; kelkaj el ili daŭrigis sian restadon en aliaj cellokoj de la regiono: Napolo, *Ischia, la Amalfi*-riviero, ktp. Dankon al ĉiuj partoprenantoj kaj organizantoj! *(Trad: ViTo)*



# Il viaggio della volontà: dalla libertà del “male” alla libertà dal “male”
# Vojaĝo de la volo: ekde la libero de la 'malbono' al la libero el la 'malbono'

1) Comincio questo scritto esaminando singolarmente le parole del titolo (cioè il viaggio, la volontà, la libertà e il male) da un punto di vista psicologico-metafisico, senza sconfinare nel campo etico, e concluderò con alcune brevi e tuttavia curiose considerazioni.

2) **Il viaggio**

Questa parola simbolicamente indica il processo evolutivo della volontà, che può essere più o meno completamente effettuato da ogni uomo (e a seguire dall'umanità).

3) È sufficiente confrontare:

- il primo vero atto di volontà, cioè il '**no** che divide' detto dall'adolescente nell'affermare la sua individualità contro i genitori, contro gli adulti in genere (e inconsciamente contro Dio);
- con la azione culminante della volontà, con il '**sì** che unisce' del santo (o del saggio), che conforma la propria volontà a quella divina anche a costo della vita (famoso esempio di ciò sono le parole di Gesù sulla croce: "Sia fatta la Tua Volontà!").

4) Da questo confronto si può comprendere che c'è differenza di livello (quindi di qualità) fra le due volontà, e che è possibile ad ognuno di noi effettuare il **viaggio** che unisce quei due livelli, come ci hanno mostrato alcuni nostri illustri predecessori.

1) Mi komencas tiun ĉi skribaĵon per la unuopa ekzameno pri la vortoj de la titolo (t.e. la vojaĝo, la volo, la libero, kaj la malbono) el psikologia kaj de metafizika vidpunktoj, sen translimiĝi en etikan kampon, kaj mi konkludos per iuj mallongaj tamen kuriozaj prikonsideroj.

2) **La vojaĝo**

Tiu ĉi vorto simbole indikas la evoluprocezon de la volo, kiu povas esti pli aŭ malpli komplete plenumata fare de ĉiu homo (kaj sekve de homaro).

3) Sufiĉas kompari:

- la unuan veran agon de la volo, t.e. la disig(ant)an '**ne**' de la adoleskanto kiu asertas sian propran individuecon kontraŭ la gepatroj, ĝenerale kontraŭ la plenkreskuloj (kaj nekonscie kontraŭ Dio);
- kun la kulmina ago de la volo, kun la unuiĝanta '**jes**' de la sanktulo (aŭ de la saĝulo), kiu konformigas sian propran volon al la Dia Volo ankaŭ koste de sia vivo (fama ekzemplo pri tio estas la vortoj de Jezuo sur la kruco "Estu farata Via Volo!").

4) Post tiu komparo eblas kompreni, ke estas malsameco de nivelo (do de kvalito) inter la du voloj, kaj ke eblas al ĉiu el ni plenumi la **vojaĝon**, kiu kunligas tiujn du nivelojn, kiel montris al ni iuj niaj altnivelaj antaŭuloj.

**Schema della struttura psichica umana Ovoide Assagiolano:**
**(ovvero, la costituzione psicologica dell’uomo)**

1. L’inconscio inferiore
2. L’inconscio medio
3. L’inconscio superiore
4. Il campo della coscienza
5. Io cosciente (o io fenomenico)
6. Sé Transpersonale (o Spirito)
7. L’inconscio collettivo




**Skemo pri la Homa Psika Strukturo Assaĝiola Ovoido:**

1. Malsupera nekonscio
2. Meza nekonscio
3. Supera ne konscio aŭ Superkonscio
4. Kampo de la konscio
5. Konscia egoo aŭ fenomena egoo
6. Transpersona Sio
7. Kolektiva nekonscio

Tratto da: L’atto di volontà di Roberto Assagioli - El: Akto de volo, Roberto Assagioli

5) **La volontà**

La volontà è una facoltà spirituale esclusiva dell'essere umano, che ha come oggetto formale l'essere (come tutte le altre facoltà umane), tuttavia specificamente 'visto' come **bene** (per il soggetto, in quel preciso momento).

6) La volontà può appetire (o meglio amare) **tutto** ciò che l'intelletto può 'vedere' come bene. Tuttavia il primo bene da cui dipendono tutti gli altri è l'esistenza, quindi noi possiamo volere solo ciò che già esiste nella realtà o nella nostra mente.

7) O se preferite, noi non possiamo consciamente (ma il termine 'consciamente' è ridondante perché è implicito nel concetto di volere, quindi si può anche togliere) volere ciò che non conosciamo.

(Ciò è ovvio, infatti come posso volere qualcosa che non percepisco almeno confusamente?)

8) Il fatto che è assolutamente necessario precedentemente conoscere il bene che si desidera per mezzo dell'intelletto, significa che, per volere, noi abbiamo bisogno di un motivo razionale.

(Per esempio, l'uomo che fuma, malgrado sappia che fumare fa male, lo fa solo perché pensa: "In questo momento è più utile per me fumare", naturalmente i pretesti sono parecchi: per aiutare la digestione; ho bisogno di rilassarmi; mi dà piacere; dopo il caffè è un rito; ecc.)

9) La volontà è spirituale, cioè è una facoltà incorporea, perciò essa non risiede in nessun organo fisico; come del resto l'intelletto, che non risiede nel cervello come molti erroneamente credono (al contrario, le altre facoltà umane sono corporee, perciò esse risiedono in organi o apparati fisici: la vista negli occhi; le emozioni nella regione limbo-ipotalamica al centro del cervello; l'immaginazione e la percezione in specifiche regioni della corteccia cerebrale; ecc.)

10) Prove della incorporeità della volontà sono:

1 - Il fatto che l'atto di volontà è intimo e intellettuale: infatti in sé stesso non im-

5) **La volo:**

La volo estas spirita fakulto ekskluziva de la homa estaĵo, kiu havas kiel formalan objekton la eston (kiel ĉiuj homaj fakultoj) tamen specife 'vidita' kiel 'bono' (por la subjekto, en tiu preciza momento).

6) La volo povas deziri (pli bone ami) **ĉion,** kion la intelekto povas 'vidi' kiel bona.

Sed la unua boneco, de kiu dependas ĉiuj la aliaj, estas la ekzisto, do ni povas voli nur tion, kio jam ekzistas en la realo aŭ en nia menso.

7) Aŭ se vi preferas, ni ne povas konscie (sed la termino 'konscie' estas redundanca, ĉar ĝi estas implicita en la koncepto 'voli', do oni povus forpreni ĝin) voli tion, kion ni ne konas.

Tio estas memkomprenebla, fakte kiel mi povas voli ion, kion mi ne perceptas (eĉ konfuze)?

8) La fakto, ke nepre necesas la antaŭa kono pri la dezirata bono fare de la intelekto, signifas, ke por voli ni bezonas racian kialon.

(Ekzemple, la homo kiu fumas, malgraŭ li/ŝi scias, ke fumi estas danĝere, estas nur pro tio, ke li/ŝi pensas: "En tiu ĉi momento estas pli utile por mi fumi" (verŝajne la pretekstoj estas pluraj: por helpi la digestadon; aŭ mi bezonas rilaksiĝi; aŭ tio donas al mi plezuron; aŭ post kafo estas rito; ktp).

9) La volo estas spirita, t.e. ĝi estas senkorpeca fakulto, pro tio ĝi loĝas en neniu fizika organo; kiel cetere la intelekto, kiu tute ne loĝas en la cerbo kiel multaj uloj erare opinias (kontraŭe la aliaj homaj fakultoj estas korpaj, do ili loĝas en fizikaj organoj aŭ aparatoj: vidado en okuloj; emocioj en limbo-hipotalama regiono meze de la cerbo; imagpovo kaj perceptado en specifaj regionoj de la cerebra kortiko; ktp).

10) Pruvoj pri la nekorpeco de la volo estas:

1 - La fakto, ke la akto de la volo estas intima kaj intelekta: fakte per si mem ĝi

plica nessuna emozione, nessun cambiamento organico; esso può consistere solo in un tranquilla e 'fredda' decisione e le conseguenze fisiche possono persino mancare (questo fatto è alla base dell'ascetismo); si noti che spesso anche le più gravi decisioni sono prese a “sangue freddo”.

11) 2 - Il desiderio ( o meglio l'amore) di beni immateriali (virtù, onore, giustizia, ideali, geometria, scienza, religione, filosofia, arte, Dio, ecc.): infatti ciò che è incorporeo non conviene a ciò che è corporeo (per esempio i libri non interessano le bestie), e l'uomo può persino offrire la vita per un ideale.

Certamente la volontà può anche appetire beni concreti, ma solo perché essi realizzano il concetto di bene; per esempio, io posso volere beni corporali (il mangiare, il riposo, la salute, ecc.) perché essi indirettamente servono allo Spirito, cioè essi sono utili al corpo attraverso il quale lo Spirito si manifesta.

12) 3 - La infinitezza della volontà: il naturale desiderio della nostra volontà non potrà mai essere completamente soddisfatto da un bene parziale conosciuto come tale; soltanto ciò che l'intelletto riconosce come completo bene potrebbe accontentarlo.

Questo ci dà la misura della volontà: essa è fatta per l'Infinito (essa è fatta per Dio).

Ciò significa che la causa finale della volontà è l'Infinito, di conseguenza sfamare l'uomo solo con cose finite, effimere, mortali è ridurlo allo stato di bruto.

13) Qui giace il motivo della libertà umana: tutto ciò che è finito è nulla per la volontà (che è destinata all'infinito), infatti essa indifferentemente può rifiutare ogni essere materiale con disprezzo o accettarlo quasi con degnazione.

14) La volontà, essendo una facoltà, cioè




implicas neniun emocion, neniun organan ŝanĝon; ĝi povas konsisti nur el trankvila kaj 'malvarma' decido kaj la fizikaj sekvoj povas eĉ manki (tiu ĉi fakto estas ĉe la bazo de la asketismo); bonvolu noti: ofte la plej gravaj decidoj estas 'malvarm-sange' faritaj.

11) 2 - La deziro (aŭ pli bone la amo) pri nemateriaj bonoj (virto, honoro, justeco, idealoj, geometrio, scienco, religio, filozofio, arto, Dio, ktp): fakte tio, kio estas senkorpa, ne konvenas al tio, kio estas korpa (ekzemple, libroj ne interesas bestojn), kaj homo povas eĉ oferi sian vivon por/pro idealo.

